

Revue de religion comparée bilingue (espéranto et français) / Religi-kompara revuo
 Association Internationale d'Etude des Enseignements Spirituels et Théologiques

ASISTI : Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj

Neŭtrale kunlaboranta kun TEL (Tutmonda Ekumena Ligo), JBLE (Japana Budhana Ligo Esperantista), EPA (Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto), UTSLE (Universala Tao-Stud-Ligo Esperantista), OKEJ (Ortodoksa Klubo de Esperantistaj Judoj), U. E. A., ŬEA (Ŭon-budhisma Esperantista Asocio).
 Membro de WCRP (*World Conference on Religion and Peace* / Monda Konferenco pri Religio kaj Paco), asociita al IARF (*International Association for Religious Freedom* / Internacia Asocio por Religia Libereco).
 Subtenas la Iniciaton por **Unuiĝinta Religiaro** (*United Religions Initiative*), fondota en junio 2000.

Kelkajn miliardojn da jaroj post la (unua ?) "**Granda Eksplo**do" (laŭ astrofiziko),
 "7492 jarojn post la kreado de la mondo" (laŭ la Aleksandria erao)
 "5760 jarojn post la *kreado de la ĉielo kaj de la tero*" (Juda erao),
 la 5113^{an} jaron laŭ la Majaa erao,
 5100 jarojn post la komenco de la *Kali Yuga* (Hindua erao)
 4696 jarojn post la surtroniĝo de la *Flava Imperiestro* (Ĉina erao),
 "4492 jarojn post la **diluvo**" (Armena erao),
 'Oλ. 693, 3 : la 3-an jaron de la 693-a olimpiado (laŭ la Greka erao),
 MMDCCLII° *ab Urbe condita*: 2752-an jaron ekde la fondo de la *Urbo* (Romia erao),
 "2543" jarojn post la *mahâ-pari-nirvâna* (morto) de la Budho (Budhana erao),
 "2516" jarojn post la nirvano de Mahaviro (Ĝajna erao),
 2056 *samvat* post la surtroniĝo de la hindua reĝo *Vikramâditya* (Vikrama erao),
 "2000" jarojn post la **naskiĝo de Jesuo**, "enkarniĝo de la *Parolo*" (Kristana erao),
 1921 jarojn post la surtroniĝo de hindua reĝo *Ŝâlivâhana* (*Ŝaka* aŭ *Mahasakaraĝ* erao),
 1698 jarojn post la fondo de la *Respubliko* (Sanmarina erao),
 1420 jarojn post la heĝiro de Mahometo (Islama erao),
 CCVIII^{an} jaron de la *Erao de la Francoj* (laŭ la "Respublika kalendaro"),
 la 156^{an} jaron post la Deklaro de *Báb*, "la Pordego" (Bahaa erao)
 140 jarojn post la **naskiĝo de Zamenhof** (Homaranisma erao),
 112 jarojn post la publikigo de la *Unua Libro* (Esperantista erao),
 100 jarojn post la **fondo de IARF** (*Internacia Asocio pro Religia Libereco*),
 40 jarojn post la **eksiliĝo de la 14-a Dalai-Lamao** (Tibetrezista erao),
 ... 10 jarojn post la **fondo de ASISTI** (nia propra eta erao...),
 duonjaron antaŭ la fondo de *Unuiĝinta Religiaro* (Interreligia kaj Paca Erao ?),
 inter suneklipso kaj **lun-eklipso** (21 ĝis 22-1-2000)
 kaj do, jes ja !, inter du jarmiloj da kristana erao,

Bonajn jubileojn !

Vorto de la redaktoro

Ne sciante vortigi miajn plej elkorajn kaj profundajn bondezirojn por la novaj jaro, jarcento kaj jarmilo, mi sendas al ĉiu el vi senbruan sed varman rideton...

kvankam homoj daŭre suferas : aŭ, en prizono, de *aktiva* malhumaneco, tamen kontraŭstarebla de ekstere ; aŭ, pro preskaŭ same krima *pasiveco*, fariĝante blindaj pro *Evidente-forigeblaj* kaŭzoj...

Sed mi restu esper(ant)isto : kvazaŭ profesiulo ne nur pri esperanto sed ankaŭ pri espero (ĉar la redaktoro devas zorgi ankaŭ pri mono : vidu sur p. 15, kaj ĉefe bonvolu plenigi kaj reŝendi la ĉi-kunan abonilon kaj aliĝilon...)

Ĉiuj kune kaj aktive ni sukcesos plibonigi la mondon de morgaŭ kaj de venontaj jarmiloj.

N.B. **Bonvolu** laŭeble **sendi** viajn artikolojn ktp. en formo de dokumentoj en *Word.6* (aŭ kongruaj : *Word Perfect...*) **sur disketoj** (3 1/2), **plie de** la surpapera kutima formo : tiel mi ŝparos la enkomputiligan retajpadon. **Mi ankaŭ povas ricevi ilin fakse (modeme).**

Ligila Organo de ASISTI (Asocio de studado internacia pri spiritaj kaj teologiaj instruoj) ĉ. trimonata

Red.: Presbytere F-09800 Balagué. Tel/Faks 33 561 047 066

ASISTI-estraro : Prez. Y. Umeda – B. Moro : kasisto (Skrytka 147, PL-47-220 Kedzierzyn-Kozle, Pollando) – Ch. Lavarenne : sekretario kaj vickas. – G. Berveling : eksteraj rilatoj – L. Nordenstorm : Religia Antologio.

Directeur de Publication : Christian Lavarenne

Jarabono : triono de UEA-individa abono (*MA*), t.e. 105ff / 35gld / 30DM / 20\$ (duone por malriĉaj landoj) al :

– CCP *Asistilo*, 1042177R *Marseille* (nur en frankoj!)

– UEA-konto *asis-r*

– FEL-konto *clvr-n*

– B. Moro, Srytka 147, PL-47-220 Kedzierzyn-Kozle

Subtena abono : ekde 150 ff / 50 gld / 50 DM / 30 eŭroj

Abonhelpa fonduso : pliaj abonoj laŭ la tarifo valida por vi mem ; vi rajtas indiki la adresojn de la ricevontoj...

ASISTI-kotizo 1998 : deviga por esti membro, kiom ajn ĝi estu (sed **minimуме kvarono de la UEA-MJ** : 7 eŭroj, por okcident-Eŭropo, norda Ameriko, Japanio)

Subtena membro : ekde 200ff / 70 gld / 70 DM / 40 eŭr.

...Ne forgesu kontribui, koran dankon !

Enhavo

Ĉu juna monaĥino restos en prizono ĝis 2013 ? (Tibeto)	p. 4
Interreligia Asembleo (I), kaj 3-a Parlamento de la Religioj de la mondo (Sud-Afriko)	p. 6
La nekonata <i>Nekonata vivo de Jesuo-Kristo (...laŭ Notoviĉ)</i> , de Prof. Douglas (Bharato)	p. 6
Sektoj, Nova Erao kaj religia toleremo , de Henri Tincq (<i>Le Monde</i> , F)	p. 8
Ĉu pentekostistoj superis eĉ esperantistojn ? (BR)	p. 9
Religia maltolero, de BKWSU ĉe UNa Komisiono pri religia maltolero (CH)	p. 9
Konkreta ekzemplode miskonfuzajo : el publika letero al deputitoj (F)	p. 9
Sektoj kaj Esperanto : <i>Ya-zu</i> (Mongolio), <i>Blanka Universala Fratara</i> (F), <i>Urancio</i> (F)	p. 10
Mendelssohn : komponisto dum la tempturniĝo, de M. Sturm-Berger (D)	p. 11
Interesaj respondoj, de Claude Piron ; intervjuita de Hokan Lundberg (CH/S)	p. 12
Leteroj : Olúwábùnmi Gabriel Oshó-Daues (Niĝerio), Kambiz Ghadiri (Irano)	p. 15
<i>La Serio pri Gilgameŝ</i> : Iŝtar kaj la Ĉiela Virbovego (Sesa Tabuleto) (Ninevo kaj Uruko)	p. 16
Impresoj pri islamo en Bosnio, de Christian Moe (Bosnio/N)	p. 19
Jogo-semajno en Grésillon , de Rose-Marie Laveau (F)	p. 20
Interreligia preĝoro en Berlino, de Eric Coffinet (F/D)	p. 20
<i>Instituto por Religiologio kaj Tutmonda Federacio de Relegioj</i> , de Prof. Jezierski (PL)	p. 20
Supera Silezio, somere 1999 : Religia centro de Esperantujo, de Bradjo V. Moro (PL)	p. 21
Eklipsoj kaj Biblio, de Christophe Yono Lanier (kaj Daniel Solakian) (F)	p. 22
<i>La Serĉado de l'Gralo</i> : La iamaj virtoj de Lancelot... (el la romanika, 13-a jc.)	p. 24
Esperanto-rezolucioj : IARF kaj Internacia Konferenco de NROj (Koreio)	p. 27
Leteroj : V. Strejcek (CZ), I.R. Carlisle (Sud-Afriko), R. Glossop (USA), R. Corsetti (I)	p. 27
<i>Jogosutro</i> de Patanĝali : la Plenumado, kun komentario de Vjaso (Bharato)	p. 28
<i>Granda Unueca Kredo</i> (ĉapitro 2-a : <i>Mekanismo</i>), de Jebumo (Ĉinio)	p. 30
<i>Tao Te Ching</i> , de Lao-tzu ; trad. de Bradjo V. Moro (PL/Ĉinio)	p. 30
Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista , de Inĝ. Boĝidar Leonov (BG)	p. 31
Leteroj : <i>Santiago</i> de R. Fischer (D), J. Lépeix (F), Nlandu Lnyala (Zairo)	p. 31
Ni ricevis : religiaj kaj spiritaj libroj , broŝuroj kaj novaj gazetoj	p. 32



La "ridetanta anĝelo"
ekster la Remsa katedralo (F)

Un sourire

(Anonyme)

Un sourire ne coûte rien
mais il met la joie au coeur.

Il enrichit celui qui le reçoit
sans appauvrir celui qui le donne.

Il ne dure qu'un instant
mais son souvenir est parfois éternel.

Personne n'est assez riche pour s'en passer ;
personne n'est assez pauvre pour ne pas le mériter.

Il crée le bonheur au foyer ;
il est le signe de l'amitié.

Un sourire donne du repos à l'être fatigué,
rend du courage au plus découragé.

Il ne peut ni s'acheter, ni se prêter, ni se voler,
car c'est une chose qui n'a de valeur
qu'à partir du moment où il se donne.

Et si parfois vous rencontrez une personne
qui ne sait plus avoir le sourire,
soyez généreux, donnez-lui le vôtre :

car nul n'a autant besoin d'un sourire
que celui qui ne sait pas en donner aux autres.



Rideto

Rideto kostas nenion
sed ĝi metas ĝojon en la koron.

Ĝi riĉigas tiun kiu ĝin ricevas
sen malriĉigi tiun kiu ĝin donacas.

Ĝi daŭras nur momenton
sed ĝia memoro kelkfoje estas eterna.

Neniu estas tiom riĉa ke li ne bezonas ĝin ;
neniu est tiom malriĉa ke li ne estas inda je ĝi.

Ĝi kreas feliĉon hejme ;
ĝi estas signo de amikeco.


Rideto donas ripozon al la laciĝinto,
rekuraĝigas la plej senkuraĝan.

Ĝi estas nek aĉetebla nek pruntedonebla nek
ĉar ĝi estas io valora ŝteblebla
nur ekde kiam ĝi estas donacata.

Kaj se iam vi renkontos iun
kiu ne plu scipovas havi rideton,
estu bona, donacu al li la vian

ĉar neniu tiom bezonas rideton
kiom tiu kiu ne scias donaci rideton al la aliuloj.

Anonima teksto



Rideto estas komunikiĝema. Ĝi estas la ununuraĵo
kiun oni povas donaci kiam oni ne plu havas ion
nek scias kion diri. (Pastoro Ch. Mazel, *Ev. et liberté*)



Antaŭ jam 15-jara monaĥino ĉu ŝi restos

"Ni insiste petas tujan kaj senkondiĉan liberigon de Ngaŭang Sangdrol..." (Amnesti-Internacia kampanjo)

Sian nunan nomon, Ngaŭang Sangdrol, ŝi ricevis kiam, **10-jara**, ŝi fariĝis novicino ĉe la monaĥinejo *Garu*, norde de Lhasao.

Jam tiam ŝi spitis la "redukadon" truditan en la monaĥejoj kaj, kvankam riskante esti batota, ŝi eĉ iris kanti sub la fenestro de la "edukistoj" liberecan kanton. "*Bonŝance ŝi [tiu-foje !] ne havis problemojn. La monaĥineja estraro nur konsilis al ŝi esti singardema. Malgraŭ sia juna aĝo ŝi jam estis la plej decidema*", memoras unu el ŝiaj tiamaj kamaradinoj nun rifuĝinta en Dharamsala, la ekzilejo de la Dalai-lamao.¹

En marto 1988 la knabineto estas en la stratoj de Lhasao okaze de *Mon-lam*, la tradicia "Granda Preĝo". Monaĥoj de Gaden, gvidantaj la procesion dum la fina parto de la celebrado, la 5-an de marto, komencis alvoki por la liberigo de unu el iliaj kunmonaĥoj, kondamnita je 14-jara mallibereco. "*En tiu ĉi momento la procesio laŭdire subite ŝanĝiĝis en porsendependan manifestacion*"². Ŝi ne rekte partoprenis sed, ĉar ŝi estis religiulino, ŝi estis kondukata, por du semajnoj, en la malliberejon *Gutsa*.

"*Kiam mi revidis ŝin, ŝi ne plendis pro mistraktado. Ili verŝajne liberigis ŝin pro ŝia juneco*", diris amikino¹. (Ŝi tiam estis **11-jara** !)

Ŝi neniam estis plendema, do neniu scias kion ŝi mem efektive spertis. Sed alia homo, arestita la 6-an, tie vidis "*7 monaĥojn de Chormoling severe batataj (...)* Iliaj vizaĝoj kaj korpoj fariĝis **tiel ŝveligitaj pro la batoj, ke ili ne povis demeti siajn vestaĵojn**". Kaj kvar monaĥinoj, arestitaj ankaŭ en marto, "*estis tute nuden senvestigitaj, mankatentitaj (...)* kaj batataj. Unu poste raportis ke ŝi estis *daŭre pikadita per elektraj bastonoj, de tri aŭ kvar gardistoj ; alia estis piedbatita , kaj tretita post kiam ŝi estis teren ĵetita*".²

Reveninte en sian monaĥinejon ŝi daŭrigis sian spiritan trejniĝon. Ŝi estis **brila novicino**, sed iom deteniĝema. Pri politiko ŝi malmulte parolis ; aŭ kun fidinduloj. Fakte ŝia ununaskita frato, kiun ŝi ne konis, estis surstrate mortpafita kiam li estis **13-jara** : "*Li partoprenis en grupo da junaj partizanoj, kaj tiunokte li estis foririnta por skoltado apud administra konstruaĵo. Kaj post lia morto liaj kunuloj estis publike ekzekutitaj*".¹

En julio 1990, 14-jara, ŝi sekrete iris kun kvar monaĥinoj al la eksa somera palaco de la Dalai-lamao kie estis okazonta tradicia festo. Ili sukcesis kaŝe grimpi sur la scenejon por subite krei sloganojn antaŭ miloj da homoj. La kuraĝaj infanoj vekis entuziasman solidarecon, sed la ĉeestantoj ne povis malebligi ilian arestadon. La knabino denove iris al *Gutsa*. Ĉi-foje ŝi tie restis 9 monatojn ; kaj tie la diskreta kaj pacienca novicino fariĝis ribelulino kies rakontoj jam diskoniĝis en prizonoj.



Kiam ŝi fine eliras el *Gutsa*, ŝia familio estas disigita : **ŝia patro** estis **arestita** pro posedo de tibeta flago, dokumentoj kaj sonbendoj (kaj baldaŭ kondamnita je okjara mallibereco), kaj ŝia patrino mortinta, baldaŭ post koratako eksciinte tion.

Iom poste "*respondeculino en Garu decidis sekrete reakcepti ŝin spite la malpermeson*" (kutiman pro ĵusa mallibereco). Sed la 17-an de junio 1992 ŝi denove partoprenis en malpermesita manifestacio : ŝi estis kondamnata je tri-jara mallibereco kaj eniris la plej fifaman prizanon : *Drapĉi*.

sep jaroj eniris prizonon : tie ĝis 2013 ?

Tibeto

La 72 malliberulinoj de la tria sekcio de politikaj malliberigitoj vivas 12-ope en nevarmigataj ĉeloj, kaj ĉiu disponas nur unu kovrilon, eĉ vintre. La disciplino estas trudata per bastonoj aŭ zonbatoj. La monaĥinoj rajtas nek razi sian kapon nek preĝi. (Juna monaĥino, Ĉhökji Ŭangmo, pro ĉantado de budhistaj mantroj, estis nudigata kaj surŝprucigata per glacia akvo ; ŝiaj torturistoj poste metis elektran bastonon en ŝian buŝon.)

Post multaj klopodoj ŝi rajtis po du renkontiĝojn jare kun sia patro, malliberigita kelkajn dekojn da metroj for de ŝi, en la kvina sekcio ; kaj po unu eleksteran viziton monate, de aliaj familianoj ...krom kiam ŝi estas dum pluraj monatoj en karcerio : ia fera kaĝo, sen ia kontakto kun iu.

Heroa rezistado

Ŝi estis unu el tiuj kiuj, printempe 1993, sukcesis sekrete registri kantojn sur sonbendo³. Sed dua kasedo estis malkovrita : ilia unutaga proceso okazis en la prizono mem, antaŭ la almenaŭ 500 kunigitaj prizonuloj ; ili ĉiuj konfesis la faktojn. Ngaŭang Sangdrol, ĉar ŝi estis la plej juna, estis kondamnata je nur ...6 pliajn jarojn en prizono !

Sed ŝi ne submetiĝis : en junio 1996, kiam riproĉite, kiel ĉelrespondeculino, pri la nepureco de ŝia ĉelo, ŝi respondas ke plurtaga akvomanko malbligis taŭge purigi la plankon, tibeta prigardistino provas bati ŝin. La etulino evitas la frapon kaj al-kroĉiĝas al ŝia uniformo, alvokante siajn kunulinojn : "Venu helpi min ! Ni restu unuecaj, ni ĉiuj estas ĉi tie por la sama afero !" La prigardistinoj, ĉirkaŭitaj de la prizonulinoj, bezonos voki la militistan policon por retrudi la ordon. Rezulta puno : ses monatojn en karcerio kaj nova proceso.

Juna monaĥino kiu ĉeestis elekstere, rakontis : "Ŝi estis juĝata samtempe kiel monaĥoj, mi povis nur momente vidi ŝin de for, tra fenestro, sed ŝi aspektis maldikigita, malbonfarta."¹ Pro tiu mallonga tumulteto : ok pliajn jarojn en malliberejo ! Sed tiel ŝi finfine ekfamiĝas en la tuta mondo.

Kaj tio tute ne cedigis ŝin : "Ŝajnis ke nenio povos altigi ŝin ; ŝi estis preta resti en prizono dum la tuta vivo". La 15-an de aŭgusto 1997, responde al sia familio kiu petis ŝin resti trankvila, ŝi skribis : "La konsiloj kiujn vi donas al mi estas bonaj sed mi tute ne bezonas ilin (...)

Vi multege mankas al mi, gefratoj, malfacilos vidi unu la aliajn ĝis la suno [de la libereco] levigos sur la Neĝlando."

La 1^{an} de majo 1998, okaze de vizito de Eŭrop-Unia delegacio (konsistanta el aŭstra, luksemburga kaj brita ambasadoroj), geprizonuloj "pace manifestaciis" (aŭ ribelis ?), kaj almenaŭ 11⁴ el ili mortis⁵, el kiuj 6 monaĥinoj kaj 4 monaĥoj. Iuj vidis Ngaŭang Sangdrol senmove kuŝanta kun sanganta vizaĝo post bato ĉe la kapo. Sekvoj : la (po 2 jare) renkontiĝoj kun ŝia patro estas ĉesigitaj, kvankam li, 60-jara, estas laŭdire grave malsana ; kaj ŝia mallibereco plilongigita je tri aŭ kvar jaroj.

Sed ŝi ricevis la premion de la Kongreso de la Junaj Tibetanoj ; kaj eĉ ŝtatoj ekzorgas pri ŝi : "La franca registaro konscias pri la graveco de la situacio de Ngaŭang Sandrol (...) Ni daŭrigos demandi la ĉinajn aŭtoritatojn pri la traktado de la malliberuloj pro konvinko, al kiuj apartenas tiu juna tibeta malliberulino."

Kaj ŝia famo disvastiĝadas en la tuta mondo : en junio 1999 teksto pri ŝi estis uzata por la skriba tasko de la franca ekzameno ĉe la abiturienta diplomo en Germanio. Gelernantoj de la liceo en Oldenburg preparas teatraĵon pri ŝi, titolitan "La Nebridebla Monaĥino", kiu estos prezentata en aprilo 2000 en Cholet, Saint-Nazaire, Paris...⁶ □

1/ Laŭ la enketo de Philippe Broussard, "La prisonnière de Lhassa", en *Le Monde*, 24-10-1999 p. 14-15.

2/ Vidu raportojn de Amnestio Internacia "ASA 17/03 /89 kaj 17/04/89" en *Asistilo* n-ro 5 (printempo 1990), p. 8

3/ Recenzita en n-ro 15 p. 12 kun trad. en 16 p. 13 kaj daŭre aĉetebla kontraŭ 50 FF plus sendokostoj (la profito estas uzata por la tibetaj monaĥinoj, do oni rajtas doni pli !) ĉe CSPT, 2 rue d'Agnou, F-78580 Maule.

4/ Eble eĉ 12 ?, laŭ *Tibetan Information Network*.

5/ La ĉinaj aŭtoritatoj en Tibeto fine konfesis ke la gardistoj uzis siajn armilojn sed "tamen daŭre asertas ke tiuj pafoj faris neniun viktimon" (...) La gardistoj asertas ke ili sinmortigis "glutante sian skarpon" (tiele). (*Actualités tibétaines* 12 (4-a kvaronjaro 1998), p. 6-7).

6/ Pertelefona informo de J.P. Ribes, Prezidanto de CSPT : la Komitato de Subteno al la Tibeta Popolo.

Tri monaĥoj mortis ĉi-jare sekve de torturoj ; eble ankaŭ la Panĉen-Lamao ? (laŭ *South China Morning Post*, 5-11-99), kvankam ĉinaj oficialuloj neis.

Kiel Tibetanoj aŭdis pri Jesuo

"En la 30-aj jaroj kristanismo fariĝis pli bone konata en Tibeto, dank'al tibetkultura bharatano konvertiĝinta al tiu religio. Li fondis tibetlingvan kristanan gazeton, kiun li diskonigis en nia lando. La 13-a Dalai-Lamao dankis lin pro lia laboro, kaj lin protektis kaj subtenis. De tiam la spirita gvidanto Jesuo estas agnoskita en Tibeto. Mi tiam estis tre juna. Tio estas mia unua memoro pri kristanismo." **Dagpo Rinpoĉhe** (unua tibeta budhisto ekloĝinta en Francio, en 1960; eksa instruisto pri la tibeta ĉe la *Instituto de la Orientaj Lingvoj* en Parizo.) (*Actualité des religions* n-ro 11 (dec. 1999), p. 34.)

Interreligia Asembleo en Vatikano kaj Asizo

"Aŭskultu la voĉon de Sankta Francisko. Ĉar ne estas alia ebleco krom la dialogo inter ni, inter la religioj", diris al la 200 reprezentantoj de ĉiuj religiaj tradicioj la ĝenerala sekretario de la Internacia **Islama Konsilio**, Kamal Ŝarif.

Kaj la eksa **Granda Rabeno** de Francio, s-ro Renato-Samuel Sirat diris, dum manĝa babilado: "Ni atingis nian unuan celon: **pasi de la tolero**, tiu ĉi malbela vorto stampita de malestimo, al la vera rekono kaj al amikeco. Sen ia tento pri sinkretismo."

Ankaŭ la **Dalai-Lamo** ĉeestis kaj, inter aliaj budhistoj, Dorjgotov Nyamjav kiu komentis: "Se ĉiuj niaj proponoj povus esti aŭditaj, kaj ĉefe aplikataj, la mondo estus ŝanĝita..."

La reprezentantoj estis dispartigitaj en 10 grupojn: 8 angloparolantaj kaj 2 francparolantaj...

3-a Parlamento de la Religioj de la mondo

En Kab-urbo (Sud-Afriko) okazas, de la 1-a ĝis 8-a de decembro 1999, la 3-a sesio de la Monda Parlamento de la Religioj, kun la temo: "Naskiĝo de nova tago". Kun tre probabla ĉeesto de la Dalai-Lamao, de la prezidanto de la *Islama Monda Konferenco*, kaj de la teologo Hans Küng, ĉefverkinto de la *Deklaracio de Ĉikago* (de la 2-a Parlamento), 4-9-1993, parte tradukita en *Asistilo* n-ro 15, p. 4.

Ankaŭ la gvidantaro de la **Iniciato por Unuiĝinta Religiaro** kuniĝos, el diversaj landoj, por tie proponi laborgrupojn, de la 1-a ĝis 10-a de dec. (*URI update* n-ro 6, aŭtuno 1999, kiu demandas:)

72 horoj da pac-konstruado: kion vi faros la 31-an de dec.?

"Niaj centroj en la tuta mondo estos malfermitaj al ĉiuj kiuj deziras partopreni en meditado." (*Brahma Kumaris*, Monto Abu, Bharato: Dadi Ĝanki)

La nekonata

Kial la stranga intervjuo de la ĉi-apuda dokumento, subskribita de la **Ĉef-Lamao de Himis kaj sigelita per lia oficiala sigelo, en la ĉeesto de J. Archibald Douglas, Profesoro ĉe Government College, Agra (Bharato), kaj Shahmwell Joldan, eksa Poŝtestro de Ladakho, ĉe Himis monaĥejo, "Malgranda Tibeto", la 3-an de junio 1895?**¹

Kiel (unua?) elemento de promesita respondo al demandoj de legantoj (vidu 22, p. 29) pri la opinio de Claude Rouget: "La teorio [de H. Kersten] ke Jesuo studis budhismon en Bharato estas sufiĉe bone dokumentita kaj kredinda." (n-ro 20, p. 8)

La (unua?) **esperanta mencio pri ia "Tibeta Evangelio"** malkovrita en 1887 de rusa esploristo Nikolas Notoviĉ [laŭ lia pretendo], anonime aperis en la spiritisma *Almanako Lorenz 1984* (p. 111-115), kiu anoncis la baldaŭan aperon de la libro *Budho kaj Jesuo* (ĉe Budhana Ligo Esperantista).

Kaj D.A. MacGill, theravada budhano, informis en 1989, ke "kopio de la 4-a [el la 4 kajeroj eldonitaj de Notoviĉ] nun troviĝas ĉe S-ro [Hermann] Schröder, sekretario de la Budhana Esperanta Ligo [fakte BLE-prez.], kiu unue publikigis ĝin al la esperantista mondo". ("Ĉu Jesuo estas Issa?", en *La Japana Budhano*, n-ro 233, p. 12-15.)

Kaj fakte la origino de la legendo estas *La Vie inconnue de Jésus-Christ, par Nicolas Notovitch* (eld. de Paul Ollendorf en 1894, kaj kies sensanĝan reeld. de *Presses contemporaines-Ed. du Basileus*, Toulouse, 1991, 179 p., ISBN 2-908431-00-9, mi posedas).

Li raportis **nenian pruvon pri la aŭtentikeco de sia "Vivo de Sankta Issa, la plej bona el la filoj de l' homoj"**; kaj en Postskribo al sia *Antaŭparolo* li avertas ke, **bedaŭrinde**: "Dum mia vojaĝo, mi faris multajn tre kuriozajn fotojn, sed kiam, reveninte en la Hindiojn, mi ekzamenis la negativojn, montriĝis ke ili estis tute difektitaj."

Ni do komparu liajn rakontojn (sur dekstra kolumno) **kun la nea atesto** de la tiama Ĉef-Lamao.

1/ Trad. el la artikolo "La ĉef-Lamao de Himis pri la pretendita 'Nekonata vivo de Kristo'", en *The Nineteenth Century*, n-ro CCXXX (aprilo 1896), p. 667-678.

2/ T.e. ke li konfirmis ke tion li volis diri. "La demandoj kaj respondoj estis plene diskutitaj dum du longaj intervjuoj antaŭ ol esti preparataj kiel dokumento subskribota; kaj, tiel preparitaj, denove zorge retradukataj de s-ro Joldan al la Lamao, kaj pridiskutataj de tiu ĉi kun tiu sinjoro, kaj kun respektinda monaĥo kiu agis, ŝajnis al mi, kiel la privata sekretario de la Lamao." (669) ...3/ El tiu ĉi respondo kaj aliaj rimarkoj de la lamao, ŝajnis ke li **ne konas la vorton Pâli**. (*Noto de Douglas*)

4/ Tiu ĉi respondo estis farata post zorga klarigo pri kio estas la pridemanditaj objektoj. (*Noto de Douglas*)

Nekonata vivo de Jesuo-Kristo (...laŭ Notoviĉ)

1/ *Vi estas la Ĉeflamao de la monaĥejo Himis ?* – Jes. 2/ *Kiom longe senĉese vi agis en tiu funkcio ?* – 15 jarojn. 3/ *Ĉu vi mem aŭ iu el la budhanaj monaĥoj en tiu ĉi monaĥejo iam vidis ĉi tie Eŭropanon kun vundita kruro ?* – Ne, ne dum la lastaj 15 jaroj. Se iu saĥibo suferanta pro grava vundo estus restinta en tiu ĉi monaĥejo, **estintus mia devo raporti pri la afero** al la *Ŭazir* en Leh. Mi neniam havis okazon tion fari.

4/ *Ĉu vi mem aŭ iu el viaj monaĥoj iam montris kian ajn Vivo de Issa al kiu ajn saĥibo, kaj permesis al li kopii kaj traduki ĝin ?* – Ne estas tia libro en la monaĥejo, kaj dum la daŭro de mia funkcio neniuj saĥibo ricevis permeson kopii aŭ traduki kiun ajn el la manuskriptoj kiuj estas en la monaĥejo.

5/ *Ĉu vi konas la ekziston de kia ajn libro en kiu ajn budhana monaĥejo de Tibeto, pritraktanta la vivon de Issa ?* – Mi estas Lamao de 42 jaroj, kaj mi bone konas ĉiujn famajn budhanajn librojn kaj manuskriptojn, kaj **mi neniam aŭdis** pri unu kiu mencias la nomon Issa ; kaj mia firma kaj sincera opinio estas ke **nenio tia ekzistas**. Mi demandis niajn ĉefajn Lamaojn en aliaj monaĥejoj en Tibeto kaj ili ne konas kiajn ajn librojn aŭ manuskriptojn kiuj mencias la nomon Issa.

6/ *S-ro Nikolao Notoviĉ, rusa sinjoro kiu vizitis vian monaĥejon antaŭ inter 7 kaj 8 jaroj, asertas ke vi parolis kun li pri la religioj de la antikvaj Egiptoj, Asirianoj, kaj la popolo Izraelo.* – Mi konas nenion pri Egiptoj, Asirianoj kaj la popolo Izraelo, kaj konas nenion ajn pri iliaj religioj. Mi neniam menciis tiujn popolojn al kiu ajn saĥibo.

(Mi tiam laŭtlegis la libron de s-ro Notoviĉ al la Lamao, kaj li eksplodis, dirante "Sun, sun, sun, manna mi dug !" – tibeta por : "Mensogoj, mensogoj, mensogoj, nenio krom mensogoj !" – , kiel lia pripensita opinio pri la libro de s-ro Notoviĉ. Ŝajnas ke li estas perfekte kontenta pri tio ĉi².)

7/ *Ĉu vi konas kiujn ajn budhistajn tekstojn en la palia ?* – Mi konas neniun budhanan tekston en la palia. Ĉiuj tekstoj ĉi tie, pri kiuj mi havas konon, estas tradukoj el sanskrito kaj la hindia en la tibetan.³

8/ *Ĉu vi ricevis de kiu ajn saĥibo kiel donacon brakhorloĝon, vekhorloĝon kaj termometron ?*

– Mi neniam ricevis tiajn donacojn de kiu ajn saĥibo. Mi ne sciis kio estas termometro. Mi certas ke mi havas neniun en mia posedo.⁴

9/ *Ĉu vi parolas la urdu-an, aŭ la anglan ?*

– Mi scipovas nek la urduan nek la anglan.

10/ *Ĉu la nomo de Issa estas ege respektata de la budhanoj ?* – Ili scias nenion, eĉ ne konas lian nomon ; neniuj el la lamaoj iam aŭdis ĝin, krom pere de misiistoj kaj eŭropaj fontoj. □

Eltiraĵoj al kiuj la intervjuo respondas

3/ Mia ĉevalo stumblis kaj mi falis teren tiel malbonŝance ke mi rompis mian dekstran kruron (...). Mi ordonis ke oni transportu min ĝis Himis (...). Ni transpasis la sojlon de la pordoj de Himis (...). Ĉio ĉi okazis sub la rekta atenta rigardo de ilia superulo, kiu ameme prenis la manon kiun mi etendis al li por danki lin pro lia boneco. (p. 92-93)

4/ Finfine cedante al miaj ardaĵ petoj, li [la respektinda maljunulo kiu estris la *gompa*, t.e. monaĥejon] alportis al mi du dikajn **kartonajn librojn**, kies grandaj folioj estis el tempoflavigita papero ; li tiam legis al mi la biografion de *Issa*, kiun mi zorge notis laŭ la traduko de mia interpretisto. (93)

5/ "Por alkonformiĝi al longa kutimo, ĉiu lernanto aŭ lamao kiu vizitis Lhasaon nepre donacas unu aŭ plurajn kopiojn [el "la 84.000 ekzistantaj" originaloj!] al la konvento al kiu li apartenas ; nia *gompa*, i.a., posedas jam grandan nombron el ili (...). Inter tiuj kopioj, troviĝas priskriboj pri la vivo kaj agoj de la **budho Issa**, kiu **predikis la sanktan doktrinon en Hindio kaj ĉe la filoj de Izraelo**, kaj kiu estis mortigata de paganoj, kies idoj adoptis la kredojn kiujn li disvastigis ; kaj tiuj kredoj estas la viaj." (89)

6/ [La Lamao respondis] : "(...) La antikvaj **Egiptoj** adoris bestojn, arbojn kaj ŝtonoj, la ventojn kaj la pluvojn. (...) Serĉante la vojon kiu devis konduki ilin ĝis la piedoj de la Kreinto, la **Asirianoj** turnis siajn rigardojn al la astroj, kiujn ili kontemplis sen povi atingi ilin (...). Eble estas la izraela popolo kiu montris laŭ la plej evidenta maniero la amon de la homo por ĉio kio estas konkreta ; malgraŭ serio da mirigaj mirakloj faritaj de la granda **Kreinto**, kiu estas la sama por ĉiuj popoloj, la **popolo Izraelo** ne povis eviti fandi dion el metalo, en la minuto mem kiam ĝia profeto *Mossa* interparolis kun la Kreinto !" (85-86)

7/ "Ruloj alportitaj el Hindio al Nepalo, kaj de Nepalo al Tibeto, rilataj al la ekzisto de Issa, estas **verkitaj en la Pali-a lingvo**, kaj nune troviĝas en Lhasao, sed kopio en nia lingvo ekzistas ĉe ni." (91)

8/ Post du tagoj, mi ekspedis al la ĉeflamao donacon konsistantan el vekhorloĝo, brakhorloĝo kaj termometro (92). Li ofte eligis el ilia ujo mian vekhorloĝon kaj mian brakhorloĝon, demandante min pri la maniero streĉi ilin kaj pri ilia uzo. (93)

10/ "Nur la grandaj lamaoj konas lin, studinte la rulojn kie lia vivo estas raportita. Sed ĉar lia doktrino ne konsistigas kanonan parton de budhismo kaj ĉar la adorantoj de Issa ne rekonas la aŭtoritaton de la Dalai-Lamao, oni ne rekonas, en Tibeto, la profeton Issa kiel unu el la ĉefaj sanktuloj." (91) □

Sektoj, Nova Erao

(...) La universitatano Jean-François Mayer, kunlaboranto de la svisa federacia fako de justico kaj polico, **jene konkludas sian raporton** verkitan [en septembro 1998]: "*La grandega majoritato de la minoritataj religiaj grupoj konsistigas danĝeron nek por siaj membroj nek por la ŝtato.*"

Se necesus pruvoj de la konfuzo de la mensoj kiu regas pri sektoj, *Nova Erao* kaj religiaj grupoj kiuj svarme multiĝas ĉesojle de la jaro 2000, oni trovas ilin kunigitajn en la aktoj de kongreso kiu kunvenigis [en septembro 1998] en Torino **ducent amerikajn kaj eŭropajn fakistojn**, laŭ iniciato de CESNUR (*Centro de studado pri novaj religioj*).

Neracia religiemo

(...) La malfortiĝo de la kontestismaj utopioj, de la sekularaj ideologioj [tio signifas ĉefe komunismon kaj marksismon], de la [long]historiaj eklezioj kaj la minaco de nukleaj aŭ ekologiaj katastrofoj kontribuis al la leviĝo de neracia religiemo, kiu fariĝis potenca komercfonto por la orientaj guroj aŭ la predikistoj de nova biblia ordo.

Tiu dissemiĝo de nekontrolitaj grupoj kiuj pretendas sin religiaj aŭ psikoterapeŭtikaj, estas nur ĉe sia komenco. Ĝi estas plirapidigita de la popolmigradoj aŭ de retoj tiaj kia estas la interreto. (...)

En **Svedio**, malnove luterana lando, la preĝejoj malpleniĝas (11 milionoj da praktikantoj en 1970, 7 en 1997), sed mormonoj, jehovatestantoj, islamanoj, ortodoksuloj, katolikoj estas en kresko.

La **orienteŭropaj** landoj siavice eklernas religian plurecon. Spite la protestojn de la usona ŝtatedepartemento kaj de Vatikano, la ortodoksa **Rusio** adoptis en 1997 leĝaron restriktan kontraŭ baptistoj, katolikoj kaj aliaj minoritatoj.

Ĉiuj fakistoj konjektas progreson de la protestantaj, hinduaj, islamaj fundamentismoj. (...) Naskiĝintaj en la kvartaloj la plej malfavorigitaj de **Sud-Ameriko**, la pentekostistaj eklezioj (kiujn ofte oni erare nomas sektoj) probable havos 400 milionojn da membroj en la jaro 2000¹, en ĉiuj urbegoj de la tria mondo. Liberiĝante el sia origina fundamentismo, ili havas stud-societojn, universitatojn, kaj de nun tuŝas la intelektajn mediojn. La usona sociologo Harvey Cox rigardas pentekostismon kiel la religion de la 21-a jc. (¹ Sed vidu sur sekva p.)

Konverti la lingvaĵon

(...) Tiel tragikaj aferoj kiel la **masakro** en *Waco*¹ en Teksaso aŭ la kolektivaj sinmortigoj de *Ordeno de l'suna templo* aŭ de la sekto *Pordego al la Ĉielo* en Kalifornio, **devigis la ŝtatojn reagi**, multigi la agadojn de **prevento, kontrolo kaj edukado**. Sed la universitataj fakistoj kunvenintaj en Torino ne ĉesas ankaŭ **alarmi** la publikon pri la riskoj, rilate la liberecojn, de la nuna **kontraŭsekta psikozo**.

En oficialaj raportoj Francio kaj Belgio **kredis bone, publikigi listojn kie**, apud satanaj grupoj aŭ efektive danĝeraj sektoj (tiaj kiaj *Mandarom*, aŭ *La Infanoj de Dio*, kiu alinomiĝis *La Familio [de Amo]*), **estas registritaj nedanĝeraj** kaj tradiciaj esoteraj **grupoj** (tiaj kia *La Ora Rozkruco*) aŭ komunumoj en rilato kun episkopoj (...)*

De post la publikigo de tiuj listoj – ellaboritaj **el nuraj policaj informoj aŭ el** enketoj faritaj de la defend-asocioj [en Francio, ĉefe **ADFI**: *Asocio de Defendo de la Familio kaj de la Individuo*] – **ekskluzivigoj trafas asociojn**, al kiuj oni ne konsentas pruntelui kunvenejojn, **instruistojn aŭ kuracistojn publike "denuncitajn"**. Nenia debato plu eblas nuntempe inter la universitatoj kaj advokatoj fakiĝintaj pri religiaj minoritatoj kaj tiuj kiujn Anne Morelli, profesoro ĉe la (laika) libera universitato en Bruselo, eknomis en libro "**la sekto de la kontraŭsektuloj**".

Morala paniko

Laŭ Massimo Introvigne, direktoro de *Centro de studado pri novaj religioj* en Torino, okazus, rilate religiajn minoritatojn, ia "morala paniko" bazita sur amasmediaj troigoj, fantaziaj statistikoj¹, detruogaj miskonfuzadoj. Pro manko de nekontestebla difino, la esploristoj denuncas kiel **arbitran la distingon inter "religio"** – kiu estus ejo de libera volo – kaj "**sekto**" (**tre malklara nocio**, al kiu la anglalingvanoj preferas la vorton *cult*), kiuj estus ejo de subpremado. [Ili ankaŭ denuncas] la misuzon de esprimoj tiel malprecizaj kiel "cerbolavado" aŭ "mensa manipulado"; aŭ la limiĝon de esploroj pri sektoj je intervjuoj nur de eksaj membroj kaj viktimoj.

La policaj raportoj ĵus publikigitaj en Italio, Svisio, Germanio, same kiel la raporto de S-ro Berger al la Eŭropa Parlamento, ne falis en la facilecon konsistantan el produktado de listoj pretekstante ke pli bone estas riski malutili al nedanĝeraj grupoj ol lasi agi movadojn tiel perversajn kiel la *Ordeno de la suna templo*. Ĉar **justeco postulas ne plu kunŝovi en la saman fakon** grupojn kiuj estas malaj en ĉio, kaj preferi, kiel faris Svisio pri *Sciencologio*, apartajn ekzamenadojn por ĉiu kazo, kaj el diversigitaj fontoj. □

Henri Tincq (la kutima subskribinto de prireligiaj artikoloj en *Le Monde*; 17-9-1998)

* 172 "sektoj" en la parlamenta raporto Gest-Guyard.

kaj religia toleremo

Ĉu pentekostistoj superis eĉ esperantistojn ?

"Evangelastaj" statistikoj, jen kiel la brazila gazetaro prezentis la rezultojn de esplorado de SEPAL (*Servo por la evangelizado de Sud-Ameriko*), kiu denove evidentigas la emon de la "evangeliaj" [= pentekostistaj] komunumoj troigi sian ciferojn: ekzemple, **enkalkulante en la nombron de siaj anoj homojn kiuj unufoje vizitis iliajn ejojn!**

Tiel, la *Kunvenoj de Dio* ne havus 14 sed nur 2,4 milionojn da fideluloj; kaj la grupo *Dio estas Amo*, pretendanta konsisti el 2,7 milionoj da anoj, fakte estus nur 170.000-membra. Sume la "evangeliaj" kristanoj estus en Brazilo 20 milionoj, kaj ne la duoblo kiel ili fanfaronas!

(El *Actualité des religions*, 11-1999, ...krom la titolo!)

Religia maltolero

La 12-an de aprilo 1999 en **Ĝenevo**, la **Komisiono pri religia maltolero** aŭskultis, en sia 55-a sesio, la specialajn Raportantojn pri religia maltolero (...) kaj la sendependan Fakulon pri la rajto je rehonorigo de viktimoj de gravaj atencoj kontraŭ iliaj homrajtoj.

Tiuokaze la Komisiono ankaŭ aŭskultis i.a. reprezentantinon de la *Brahmo-kumara monda spirita universitato* (BKWSU), kiu jene enkondukis sian komunikadon:

"Ŝajnas ke la religia maltolero atingis apogeon ĉar ĝi nuntempe konsistigas la kaŭzon de konfliktoj kaj militoj en multaj regionoj de la mondo. Svamas ekzemploj sur ĉiuj kontinentoj, inter la fideluloj de ĉiuj grandaj kredoj de la mondo. Eĉ religiaj tradicioj tiaj kiaj Budhismo aŭ Hinduismo, devigataj al la principo malperforto, konis situaciojn kie popoloj apartenantaj al tiuj kredoj, turnis sin al perforto."

Kaj ŝi konkludis ĝin pri pli preciza punkto:

"Sinjorino Prezidantino, la Speciala Raportanto notis en siaj "Konkludoj", ke *"malgraŭ la sinsekva adoptado de internaciaj iloj por la homrajtoj, garantiantaj la rajton de libereco je religio kaj kredo**, trudiĝas la konstato ke persistas manifestiĝoj de maltolero kaj diskriminacio bazitaj sur religioj aŭ kredoj en diversaj landoj", precipe en Eŭropo. (*Vidu *Asistilo* n-roj 17-21)

BKWSU petas ke estu nomumata Speciala Raportanto por ekzameni la situacion de la eŭropaj landoj ĉi-rilate, kaj precipe la landoj kiuj ellaborigis listojn de organizaĵoj "rekonitaj kiel sektoj" sen taŭgaj esploroj kaj sen ebleco por tiuj organizaĵoj prezenti sian laboron kaj siajn valorojn."

(Trad. el *Le Point du jour* n-ro 8, p. 13-14)

Konkreta ekzemplo de miskonfuzajo

Jen eltiraĵoj de 4-paĝa **publika letero** datita je 19-8-1999, al la **francaj deputitoj** s-roj J. Guyard kaj J.P. Brard, respektive prezidinto kaj raportinto de la *Esplor-Komisiono pri la financa, poseda kaj fiska situacio de la sektoj* (kiu raportis la 10-6-99).

La § "Komerigitaj edukaj metodoj", de la raporto *Sektoj kaj mono*, indikas ke "la metodo *Viv-Etiko* : *praktika gvidlibro de la instruanto* [estas] **vendata** kontraŭ iom pli ol **2.000 F**" [ĉ. 400 eŭroj].

La menciita gvidlibro, preskaŭ 400-paĝa, estas **vendata** kontraŭ **170 F** (...), prezo kiu apenaŭ kovras la fabrikadon (fotokopioj kaj kovrilo). Ĝia [franca] tradukado, tajpado, enpaĝigo kaj eldonado estis faritaj de skipo da **nepagitaj volontuloj** (...)

Krome, **nenia salajro** nek kompenso estas ricevita de la kunordigantoj de *Viv-Etiko* pro la seminarioj kaj konferencoj kiujn ili organizas. Fine la priakuzita dokumento baldaŭ estos **senpage** alirebla per interreto. Temas do pri duobla eraro:

- fakta eraro indikante, ŝajne sen ia kontrolado, la prezon "iom pli ol 2.000 F";
- dedukta eraro kiu, apogiĝante sur eraraj faktoj klasas *Viv-Etikon* en "komerigitajn metodojn".

(...) Laŭ nia scio **nenia enketo** aŭ serĉo de realaj informoj estis **farita ĉe Viv-Etiko** (...) Oni rajtas demandi al si mem ĉu la Parlamenta Komisiono, malgraŭ la tuta respekto kiun oni devas al ĝi cetere, nur klopodis kontroli la informojn kiujn ĝi publikigis sub sia nomo, aŭ ĉu ĝi kontentiĝis per arbitraj kaj eraraj asertoj devenantaj de aliaj fontoj.

En plena konsento kun la celoj de la Komisiono, ni ne povas ne bedaŭri ke ties noblaj aspiroj al savo de la Homrajtoj – kiuj precize konsistigas la fundamenton de *Viv-Etiko* – estas malhelpataj de tiaj atencoj al la elementaj leĝoj de etiko (...)

Ni krome petas ke estu publike agnoskita, ke **la ĉeesto de Viv-Etiko en raporto pri Sektoj kaj mono estas tute senbaza** kaj havas nenian kialon.

La nepagita skipo de kunordigantoj

80-homa "sinmortigo" : ĉu murdego ?

La *FBI* konfesas ke "**eblas ke ĝi utiligis flamiĝemajn substancojn** dum la sturmo kontraŭ la biendomo de la sekto *Davidanoj* en Waco (19-4-93). 80 adeptoj mortis en brulego samtempe televidebla kaj tiam priskribata kiel *sinmortigo*. Nova enketo komenciĝis. La *Davidanoj* inaŭguris ĉe la interreto teruran Muzeon de la holokaŭto en Waco.

(El *Actualité des religions*, n-ro 9, 11-1999, p. 6.)

Sektoj kaj esperanto

Kio estas *Ya-zu* religio ?

Jazu estas scienca nova religio. La vorto signifas "*Radiko*". *Jazu* estas fondita sur la bazo de la antikva orienta filozofio de "*La kvin-elementa teorio*". Oni povas koni ĉian leĝon de la monda kaj homa vivo per la kvinelementa teorio.

La ĉefa teorio de la 5 elementoj estas la teorio pri *Jang-Jin* (vira / ina). Ĝi estas kompara teorio, kaj ĝin povas uzi la modernaj sciencaj branĉoj.

Ekzemploj pri la *Jang-Jin* teorio: Suno estas *jang* (vira), luno estas *jin* (ina)¹. Ĉielo estas vira, mondo estas ina. Tago estas vira; nokto, ina. Okcidento estas vira; Oriento, ina. **Esperanto** estas vira; la *Jazu*-a, ina. Strategio estas vira; taktiko, ina. (Esperanto estas strategia lingvo; *Jazu*-lingvo, taktika). Kapo estas vira; koro, ina. Urina veziko estas vira; reno, ina. Varmo estas vira; malvarmo, ina. Vento estas vira; pluvo, ina...

Konsekvenco: Se kapo ekdoloras oni kuracu koro; se koro ekdoloras oni kuracu kapon per masaĝo kaj **magia parolado**. Se veziko ekdoloras oni kuracu reno; se reno ekdoloras oni kuracu ĝin per la urinvezika "*meridiano*"².

Ideo de la antikva filozofio: "*Supera kuracisto kuracas [jam] dum la sendolora [stato], malsupera kuracas dum la posta [stato, jam] dolora.*"

Se vetero estas varma oni povas turni la glason da akvo laŭ la turniĝo de horloĝmontrilo. Se malvarmas oni inverse turnu la akvon per la bastoneto.

Teorio "*Patrino kaj filo*"

Okulo estas arba elemento, lango estas fajra, buŝo estas tera, nazo estas fera, orelo estas akva.

Rezultas ekzemple ke buŝo estas "mi" (mem); nazo estas [ĝia] filo; orelo, [ĝia] amiko (kamara-do); okulo, [ĝia] malamiko; lango, [ĝia] patrino.

Baldaŭ aperos libro pri la kvinelementa teorio en la *Jazu*-a, kun Esperanta kaj angla vortareto.

Dr. Ts. Bold

1/ Sed male en la germana: *die Sonne, der Mond*.

2/ Tiu ĉi senco estas nek en *PIV*, nek en ties *Suppl.*, nek en *Esperanta medicina terminaro* (d-ro J. Hradil, UMEA, 1979, 63 p.), sed ĝi estis tiel uzata (unufoje?) de d-rino Jarnuszkiewicz dum prelego "Akupunkturo: malnova ĉina kuracmaniero" ĉe Intern. Medicinista E-Konf., 13/17-7-77 (*Konferencaj materialoj*, Krakovo: Altlerneja Konsilantaro... de Polaj Studentoj, 1977, p. 69-71.) Pri ĉi-kuracarto vd ankaŭ "Manipula terapio, akupunkturo kaj neŭtraliterapio", de K. Bochmann, en *Sciencaj prelegoj [de la] III[-a] IMEK* (en Ruse (BG), 15/19-7-1981), red. de Prof. d-ro K. Popov, UMEA/Bulgara Esperanto-Asocio, [1981?], p. 83-89. (*Noto de la Red.*)

Universala blanka frataro

Kara amiko,

6-7-99

(...) Peter Deunov (...) rekomendis al ĉiuj lerni Esperanton ĉar li diris ke esperantistoj estas la pioniroj de la nova kulturo kiu jam estas naskiĝanta.

Mi intencas eldoni alian verkon: *Vivo por la Tuto* (ankoraŭ ne eldonita), kaj reeldoni aliajn.

Plej kore,
Jean-Louis [Gobeau]

Urancio

24-10-1999

Mi lernis kaj uzas esperanton de tri jaroj. Post kelkaj monatoj mi ektradukis la 2097-paĝan *Uranicia Libro*. Mi **serĉas iun kiu povus korekti** mian laboron (la duono de la verko, cetere tradukita en la francan, hispanan, finnan, rusan; kaj nun tradukata en la germanan, ĉinan, korean kaj aliajn lingvojn).

Mi klopodas konigi tiun veran Revelacion, la aŭtentikan Bibliion de la 3-a jarmilo, en la ununura monda lingvo kapabla kontentigi la tutan mondon en estonteco kiun mi sentas proksima.

Tiu verko plurloke mencias la necesecon, ke la mondo finfine akordiĝu pri ununura lingvo por ĉiuj nacioj; ĉiu el ili cetere konservus sian propran, ĉiu homo sur la tero fariĝus dulingva, **samkiel tio okazas ĉie en la universoj**. Jen eĉ kial mi ekinteresiĝis kaj lernis esperanton, ĉar mi opinias ke ĝi estas la lingvo de la estontaj jarcentoj.

Legante tiun ĉi leteron, **vi demandos pri kia frenezulo temas. Mi havas nenian rimedon por pravigi min**, krom proponi kelkajn eltiraĵojn ĉi-malsupre...

Jeanmarie

(7 route de Vendoeuvres, F-36500 Buzançais)

Urancio, via mondo [= la tero], estas unu el la multnombraj similaj **loĝataj planedoj** kiuj komponas la lokan universon de *Nebadon*. Tiu universo, kun aliaj similaj kreitaĵoj, konstituas la superuniverson de *Orvonton*, kies ĉefplanedo estas *Uversa de kie venas nia komisiono*. *Orvonton* estas unu el la 7 evoluciantaj superuniversoj de la tempo kaj spaco, kiuj ĉirkaŭas la senkomencan kaj senfinan kreadon de dia perfekteco: la universan centron de Havona. Ĉe la koro de tiu eterna kaj centra universo kuŝas la senŝanĝa insulo de la **Paradizo**, geografia **centro de la infinito** kaj loĝloko de la eterna Dio.

(La verko estas dispartigita en 4 partoj, de kiuj jen la titoloj: *La Centra kaj Superuniversoj*; *La Loka Universo*; *La Uranicia Historio*; *La Vivo kaj Instruoj de Jesuo*: lia vivo jaron post jaro, monaton post monato, sekve **tagon post tago**, kaj fine, dum la lasta semajno de lia vivo antaŭ lia krucumado, **preskaŭ horon post horo** (77 ĉapitroj).)

Mendelson, komponisto dum la tempturniĝo

Ŝajnas ke por la aŭtoro, **M. Ŝturm-Berger** el Berlino, li estis inspirata de "Dia revelacio" de Baha'u'llah.

Felix Mendelssohn Bartholdy (1809-1847) devenis el juda gepatra domo sed lia patro Abraham, filo de la konata filozofo Moseo Mendelssohn, estis konvinkita ke li devis baptigi siajn gefilojn – por ke ili ricevu la samajn eblecojn kiel kristanaj infanoj. Tiel Felikso eniris en la evangelian eklezion de Brandenburg-Prusio dum sia 7-a vivjaro.

Pastro Wilmsen skribis al Felikso en 1825 :

"Al kiu estas donata multe, diras la Skribo, de tiu multe estas postulata. La Sinjoro lumigu kaj fortigu vian animon, kaj vivigu ĝin por la ĝojo de la gepatro, kaj kiel atesto por la mondo, por ke la arto, altigita kaj sanktigita per religio, fortigu, liberigu, nobligu kaj grandigu la animon."

Felikso ĉiam atentis kaj strebis realigi tion ĉi.

Li studis en Berlino sub influo de la teologo Schleiermacher kaj de la filozofo Hegel. La komponisto ankaŭ estis amiko de la filozofio de sia avo, kiu estis pratipo de "Nathano la saĝulo", tre konata teatraĵo de Lessing pri interreligia dialogo kaj kunvivo de religioj. Felikso frue lernis ne tro laŭte priparoli religiajn aferojn, sed ofte li komponis laŭ religiaj tekstoj kaj temoj.

Ekde sia 12-a vivjaro li amikis kun Goethe, kies verkoj intencas profundajn simbolojn. Ekzemple **Felikso muzikigis La unuan Valpurg-nokton de Goethe**, kie la persekuto de "kristanoj" kontraŭ la druidoj ŝajnas simbolo. La komponisto uzis judajn melodiojn de sia infaneco por esprimi prakristaĵojn. Tiel ili ambaŭ kritikis verŝajne perfortan akcepton de "kristaj" instruoj kontraŭ pli maljunaj religioj, kies spirita kredkerno tiel estis malkonfesata.

El la korespondo inter Felikso kaj lia amiko Johano Gustavo Droysen (1808-1884 ; filologo, historiisto kaj poeto) rezultas interesaj faktoj : li skribis ke la komponisto konis la eniron al koroj kaj animoj de preskaŭ ĉiuj homoj ; ambaŭ kredis ke Dio parolas al la homoj per signoj. Do Felikso ankaŭ estis **mistikano**. Droysen ekkonis ke "ni hodiaŭ staras en ĉiuj aferoj sur stranga punkto ; ĉie energio de la kontrastoj estas ellaboritaj, kiuj nun fine devas solviĝi ; kaj en la arto, en via arto ĝi ne malpli estos. 'Tion mi ne komprenas', mi ofte aŭdis vin diri ; sed vi faras ĝin."

[Lia Elio anoncus la venon de "la Babo"]

La malneton de oratorio *Elio* (verko 70) li ekverkis dum la jaro 1837, interrompis jam en 1839 kaj ne antaŭ la somero de 1844, dum restado en banloko Soden ĉe la Taŭn-montaro (*Taunus*), li pripensis "denove tre serioze" ; en 1846 la verko unue estis prezentata en Anglio.

En 1838 li skribis al P-o J. Schubring : "Mi esence pripensis Elio kiel veran tutan **profeton**, tian ni **bezonus hodiaŭ denove** (...) preskaŭ al la tutmondo kontraste, sed kiel portata de anĝelflugiloj."

Dum finparto de la oratorio li solene alvokis la venon de la Mesio. Tiutempe multaj homoj atendis la **revenon de Jesuo**, kiel **kalkuleblan** el *Danielo* 8,13-17*. La jaro 1844 evidente ankaŭ estis lia plej produktiva tempo, ĉar li skribis pri la tempo inter mezo de majo ĝis mezo de julio : "Mi kredas ke dum la lastaj du jaroj mi ne muzikigis publike tiel multe kiel dum la lastaj du monatoj."

Por la novjarfestoj 1843/44 li direktis sian komponaĵon pri *Psalmoj 98* (verko 91), kio kulminas : "Ĉar **Li venas por juĝi la teron**."

Mendelson sekvigis la 9-an simfonion de Beethoven (*Ĉiuj homoj fariĝas fratoj*) kaj la oratorion *Israelaro en Egiptio* de Händel. La lasta priskribas la liberiĝon de la popolo sub gvido de Moseo. Ambaŭ muzikoj estis realigitaj fine de marto, malmultajn tagojn post la permeso de la turk-osmana registaro al la judoj, libere reveni en Palestinon.

Dum la somero Mendelson preskaŭ finis sian eble plej perfektan komponaĵon, la koncerton en mi minora por violono kaj orkestro (verko 64). Ĝi strebas al unueco de solisto, orkestro kaj publiko.

Felikso tre ŝatis la Taŭn-montaron kaj ĝis hodiaŭ tie li estas amata. Pri tiu ĉi regiono ankaŭ la preskaŭ profeta poeto Johann Isaak von Gerning (1769-1837), amiko kaj protektato de Goethe, verkis interesajn spiritajn kaj mistikajn versojn. Speciale ankaŭ pri la "**Tri Tilioj**", kie **Felikso ŝatis restadi**, kaj pri Langenhain (hodiaŭ urboparto de Hofheim), kie ekde 1964 staras la **Bahaa Templo** de Eŭropo, videbla de la "Tri Tilioj".

Laŭ *Malahi* 4,5 Elio revenas antaŭ sia Sinjoro. La bahaanoj kredas, ke la Babo (en la araba "por-do" al Dio), kiu montriĝis en 1844, estis ankaŭ la reveno de Elio, ĉar li antaŭvenis alian profeton kiel Elio Elison kaj Johano Jesuon. La posteulo de la Babo estis Baha'u'llah, kiu fondis religion de unueco. Li priskribis muzikon kiel "ŝtupetaron sur kio la animoj povas leviĝi al la regno de alteco". La bahaaj instruoj diras ke Dia revelacio inspiras ankaŭ artistojn, se ili posedas purajn korojn.

Ankaŭ la bahaanino **Lidja Zamenhof** kredis ke ŝia patro estis inspirita por krei mondan helplingvon per la revelacio de Baha' u'llah, kiu proklamis tian ideon tre grava paŝo al unuiĝo de la homaro. □

* Sed vidu ties **kritikon** en Asistilo n-ro 14, p. 28-29 (en recenzo pri La **nekredebla** paradokso de Brown).

Interesaj respondoj

Kiam mi legis la laŭ mi tre legindan psikologiromanon "Tien", de Johán Valano (kaŝnomo de Claude Piron) mi ekhavis multajn demandojn pri la pensoj kaj spertoj de la verkisto. Jen kelkaj el tiuj demandoj kun interesaj respondoj kiuj pentras pensigan kaj inspiran bildon pri la profundo el kiu Claude Piron ĉerpas tiujn optimismon, esperon, inspiron, toleremon, feliĉigemon kiujn respegulas lia abunda verkaro.

■ *En "Tien" ja temas multe pri spiritaj aferoj, ĉu vi mem havis spiritajn travivaĵojn?*

Jes, mi mem havis spiritan travivaĵon, kaj ĉiutage (pli ĝuste, ĝenerale, ĉiunokte), mi ...ĉi tie mankas la vortoj por klarigi... mi diru : mi vizitas spiritan spacon.

■ *Kiam vi "vizitas spiritan spacon" ĉu tio okazas konscie kaj ĉu vi havas klarajn memorojn pri tio poste ? Se jes, kiajn ?*

Eble la vortoj viziti spiritan spacon estas malĝustaj. Mi metas min en specialan, malfacile priskribeblan psikstaton, mi diru : memhipnotan, kaj tiam **travivas meditado** **au preĝadon**, dum kiu okazas nenio speciala, krom sento de granda paco, kvieto, kaj de kontakto kun *Iu* altnivela (Dio, verŝajne).

Ofte, sed ne ĉiam, mi **ricevas indikojn** ĉu pri io farinda, ĉu pri io miskomprenata en mia vivo aŭ en la vivo de iu, kun kiu mi rilatas, ĉu pri aliaj aferoj. La sperto povas esti pure "spiritita" (senvorta, senbilda, sen aparta sensaco), sed ĝi povas enhavi ankaŭ bildojn, **iom kiel dum sonĝo**, kvankam ĝenerale pli similajn al grandaj simboloj.

Estas tre malfacile priskribi la koncernan travivaĵon. Mi konstatas, ke miaj frazoj tute ne estas adekvataj, sed mi ne scias kiel pli ĝuste esprimi min. Mi estas konscia la tutan tempon, kaj ĝenerale konservas klarajn memorojn.

■ *Vi menciis Dion, ĉu eblas klarigi kion Dio signifas kaj kio Li estas por vi ?*

Ne estas facile klarigi tion, ĉar Dio estas trans ĉio, al kio taŭgas homaj vortoj kaj konceptoj. Jam la kutimaj pronomoj ne taŭgas, pro tio, ke **Dio estas nek Li, nek li, nek ŝi, nek ĝi**. Tial mi uzos la pronomon "*di*", neologismon kiu laŭ mi estas la sola akceptebla. Kio sekvos, tio montras ne tion kio Dio estas, sed kion (kiun) mi perceptis, renkontis, ekkonis.

La devo pri intelekta honesteco devigas min agnoski ke eble temas nur pri imagaĵoj, halucinoj, deziroj, kaj ne pri iu reala. Sed mia plej profunda sento estas ke **temas pri realaĵoj**, ke tiu kiun mi ĉi-sube iom priskribos, estas iu reala, kun kiu mi aŭtente rilatas.

Lau tiuj, eble eraraj, spertoj, Dio estas iu, ne io. Di ne estas abstrakta principo, au ia Forto sen personeco. **Estas estaĵo kiu vivas, konas, scias, perceptas**, sentas kaj rilatas kun la kreitoj/kreatoj.

Ĉio kion oni povas diri pri di, estas kiel fuŝa traduko rilate al la originala teksto. Tamen fuŝa traduko donas ian ideon pri la originalo kaj estas pli bona ol neniun traduko.

– **Dio ne havas limojn**. Tio signifas ke di estas en ĉio, amas ĉiun, eĉ plej etan insekton, kiu vivas ne pli ol 24 horojn, eĉ unu etan petalon de unu eta floro sur eta planedo, kie neniun, krom di, iam ajn vidos ĝin.

– Dio estas kreanto de libero. Esti libera, tio signifas havi la povon decidi fari ion stultan aŭ aĉan. Dio estas en ĉio, do ankaŭ en heroino kaj kokaino. Di estas ankaŭ en la homoj, kiuj sorbas tiujn. Sed tion ili faras pro sia (ne dia) libera elekto. Dio estas ankaŭ en la sufero, kiu rezultas.

...– Se la kreitoj ne povus elekti aferojn stultajn aŭ aĉajn – decidi diri "*ne*" al Dio, kriaĉi al di "*Merdon !*" – ili ne estus liberaj. Ili estus kiel automatoj kapablaj fari nur tion, kion Dio programis por ili. Ili estus do kvazaŭ parto de Dio, ne apartaj estaĵoj.

...– Dio kreis/as/os **nenion aĉan**. Malbono aperas kiam io ne estas je sia ĝusta loko. Kafo en mia taso estas io bona. Kafo sur mia pantalono ne estas io bona : eĉ ne plu estas kafo, estas makulo. Heroino per si mem ne estas io aĉa. Sed kiam ĝi detruas homon kaj riĉigas mafion, ĝi ne plu plenumas sian rolon, ĝi ne plu troviĝas ĝustaloke, kaj malbono rezultas. Same estas kiam forto, kio estas io bona, fariĝas perforto.

...– **Dio estas amo**. Dia naturo estas ami. Oni ne povas ami, se ekzistas neniun. Tial la kristana / hindua ideo pri Dio samtempe unu kaj tri, aperas al mi tre verŝajna. Tial ankaŭ Dio kreas. Krei, tio estas, fare de Dio, estigi ion aŭ iun, kiu ne estas di.

...– Dio estas tiu kiu estas pli ...ol ni povas imagi, kondiĉe ke post tiu "pli" oni metu vorton kiu neniam povu elvoki mankon de amo, respekto, kompreno : **Dio estas tiu kiu estas pli amoplena, pli komprenema, pli amika, pli bela, pli forta, pli senperforta, pli ĝoja, pli arta, pli diskreta, pli plena je respekto, konsidero, estimo, pli kunludema, pli humura, pli renoviganta, pli alloganta-al-si (ktp senfine)**, ol oni povas imagi.*

...– Dio estas **kiel la sango** en la homo. Nur dank' al ĝi ni povas vivi, sed ni kutime ne vidas ĝin, kaj kiam ni vidas ĝin, tio signas ke okazis io nenormala, kaj ni emas timi. La sango nutras kaj purigas, kiel patrino bebon. Same Dio en ni. La sango estas ni, kaj tamen ne estas ni.

de Claude Piron

...- Dio estas tiu, kiu estas **en mi pli mi ol mi**, pli vera mi, pli vere mi mem, ol mi (ol mio libera kaj perceptata mi). Iel, mi kaj vi kaj ĉiuj estas la mano de Dio, la buŝo de Dio, la okuloj de Dio, ktp; kun tiu diferenco ke **Dio akceptas ke tiuj ne agu nur laŭ diaj ordonoj** : di lasas ilin liberaj.

...- Nun kiam mi tajpas ĉi tion, Dio fakte tajpas. Sed ĉar di estas perfekta kaj mi vivas sur planedo, sur ekzistonivelo, sur kiu nenio estas perfekta, mi nevole pli malpli fuŝas diajn fingromovojn (au pli ĝuste cerbomovojn) kaj la mesaĝo, kiun vi ricevas, ne estas la perfekta dia mesaĝo, nur iom (eble tre) malbonigita versio de ĝi.

...- Di kondukas la kreitojn / kreatojn **al feliĉo, sed ne rapide** (nur tiu nerapideco ebligas al la libereco funkcii). Di havas eternecon (t.e. senfinon da tempo) por ke ni atingu din, kiu estas la **senfina vivo** kaj feliĉo.

...- **Dion ni vidas** kaj aŭdas kaj gustumas kaj flaras **konstante**, sed la plimulto el la homoj tion ne perceptas. Kiam mi vidas ion belan, mi vidas Dion en tiu belaĵo. Kiam mi vidas iun suferantan, mi vidas Dion suferantan en tiu estaĵo. **Dio solidaras kun ĉiu el ni, kaj do partoprenas en ĉiu sufero, kio ne malhelpas din plene feliĉi.** (Homo, estaĵo ege limigita, kapablas samtempe feliĉi kaj senti doloron; Dio same, sed multe pli, ĉar di ne estas limigita). **La kapablo percepti belecon, ĝui pri mirinda pejzaĝo aŭ muziko, aŭ ies rideto, estas ioma partopreno nia en la dia vibrado en ni.**

Mi povus paroli pri Dio dum horoj kaj horoj, kaj tamen ĉiufoje preterlasi ege gravajn aspektojn. Mi do finas, sed ne ĉar la temo estas elĉerpita.

■ *Ĉu viaj spertoj pri Dio venis al vi dum "ekbri-
leto", aŭ ĉu ili evoluis dum longa tempo en vi?*

Nek unu nek la alia. La **unua renkonto estis longa kontakto**. Mi tuj provos rakonti, sed estas ege malfacile, ĉar **tia sperto similas nenion**, por kio vortoj ekzistas.

Mi tiutempe laboris en *Monda Organizo pri Sano*. Dum kafopaŭzo, mi diskutis kun kolegoj, ĉiuj ateistoj, kaj unu diris : *"Dio estas nur la produkto de homa imago"*. Reveninte hejmen, mi je la kutima horo enlitiĝis kaj ekdormis; sed iam, dum la nokto, mi vekigis, kun tiu ĉi frazo ripetiĝanta en mia kapo.

Tiam mi subite sentis min transportita al alia ...kiel diri? ...dimensio, sfero, universo. Mia korpo kuŝis en la lito, kaj mi iel sentis ĝin, kaj sentis la korpon de mia edzino apud la mia, sed mi (mia persono) ne plu estis en ĝi, sed en alia loko.

Kaj jen mi **devis elekti** inter du ebloj, ĉu *"Dio estas la produkto de homa imago"*, aŭ ĉu *"homo estas la produkto de dia imago"*.

Strange estis ke mi vidis ambaŭ elekteblojn, kaj tamen **mi vidis ke nur la dua estas vera. Sed** la fakto tion konстати ne forprenis la devon decidi favore ĉu al tiu, ĉu al la alia. Alivorte **mi havis la liberon mensogi al mi, trompi min**, preferi ion neveran al io vera sed, ial, apenaŭ elportebila.

En tiu momento, **mi "vidis" Dion**. La vorto ne estas ĝusta. **Mi nenion vidis, aŭdis, tuŝis aŭ flaris**. Mi diru : Dio ekevidentiĝis al mi. Kvankam mi ne "vidis" din, proprasence, **mi perceptis din kun pli da klareco ol mi nun vidas** la literojn tajpatajn sur la komputila ekrano. La certeco, la klareco, la evidento estis pli granda ol pri iu ajn alia afero kiun mi perceptis en mia tuta vivo. Dum la tuta travivaĵo, kiun mi subjektive sentis kvazaŭ jarcentojn longan, Dio troviĝis antaŭ mi, plej konkrete. **Kaj mi volis murdi din.**

Mia reago surprizis min tiom kiom min surprizis la subita ekmontriĝo de Dio. Post minuto da konfuzo, kreita de tiu ekapero, mi sentis nedireble fortegan **deziron ke tiu Dio ne troviĝu antaŭ mi, simple ne ekzistu**. Estis vera mortigdeziro. Ĝi estis tre primitiva, besta, prahoma, mi ne scias kiel priskribi ĝin. Sed ĝi estis ege forta. Mi vidis Dion, mi vidis ke di ekzistas; kaj mi samtempe volis ke mia konstato estu erara, mi volis forviŝi ĝin, mi volis ke anstataŭ Dio, estu nenio. **Kvazaŭ ekzistis nur du ebloj, ĉu : Dio ekzistas, kaj mi, ne ; ĉu : mi ekzistas, kaj Dio, ne.**

Mi sentis tiun streĉiĝon inter mia konstato kaj mia volo kiel neimageble longdaŭran luktadon. **Mi ne luktis kontraŭ Dio, kvankam iusence tion mi sentis**, mi luktis kontraŭ mia konstato. Mi rifuzis ĝin. Mi sentis ĝin terura minaco, neakceptebla. Kaj samtempe mi furiozis ke mi luktas kontraŭ mi kaj ne kontraŭ **Dio, kiu nur rigardis min, ame.**

Tiu "rigardo" de Dio al mi estis ege klara. En ĝi estis senfinaj amo, kompreno, solidareco, kun-sento, kunvibro, respekto. Respekto al mia rajto elekti laŭvole, do respekto al mia libereco, el kiu fontas – tion mi sentis treege klare – mia digno. Tiu "rigardo" samtempe ege plaĉis kaj malplaĉis. Ĝi parte vekis esperon kaj konsolon, parte furiozigis min. Tiom da bonkoreco en iu kiun mi volis elimini, estis neelportebila.

Finfine, mi elektis akcepti la realon de Dio, kaj la fakton ke mi estas produkto de dia imago, kaj **do ke mi ne estas per mi mem**. Ŝajnas ke antaŭ tiu akceptomomento, io en mi rifuzis esti kreita / kreata.

Kiam mi akceptis mi sentis kvazaŭ mia animo kliniĝas kaj tuŝas la grundon per la kapo, kiel islamanoj dumpreĝe. **Mi adorkliniĝis**, laŭ la zamenhofa vorto. Tiam invadis min sento de eksterordinara paco, feliĉo, ĝojo, kiam mi neniam spertis iam ajn antaŭe en mia vivo ; ĝojo tamen tre kvieta.

Tiam mi sentis ke mi devas ŝanĝi mian vivon. Mi ankoraŭ estis tradukisto tiutempe. Fariĝis klare al mi ke **mi de nun devos vivi vivon pli utilan**, esti je la servo de la aliaj, de la plibonigo de tiu parto de la homaro, pri kiu mi povas fari ion.

Tial mi ŝanĝis la profesion, studis psikologion kaj trejniĝis kiel psikanalizisto kaj psikoterapiisto. Pli kaj pli mia klientaro konsistis el homoj kiuj bezonas helpon en la sfero, kie la psika vivo kuntuŝiĝas kun la spirita, kie ambaŭ interkovriĝas. Tre ofte mi sentas ke ne hazarde homo petas psikohelpon ĝuste de mi, kaj ne de kolego, sed pro ia interveno de spirito.

Post tiu unua kontakto kun Dio, mi facile kutimiĝis kontakti din ĉiutage. Kelkfoje estas tre facile, aliffoje ne. Kelkfoje mi provas kontakti din, sed havas la impreson ke mi **sukcesas atingi nur sanktulon aŭ anĝelon aŭ alian spiritan estaĵon** ; sed ree la vortoj mistrafas, ĉar mi ne scias kun kiu ekzakte mi ekrilatas tiakaze, kaj aliflanke mi sentas ke **Dio estas en ili kaj agas tra ili**.

Mi nur provas diri ke jen mi havas senton pri tuja kaj rekta kontakto kun Dio, dum aliffoje, ŝajnas ke mi atingas din nur tra iu alia libera estaĵo, kiu agas relajse. Sed ankaŭ mi fojfoje sentas ke **mi estas relajso por Dio** aŭ por alia spirita estaĵo kiu mem peras Dion, aŭ peras alian, kiu peras alian, kiu peras Dion laŭ kelkfoje tre longa ĉeno.

Ĉar mi konstante rilatas kun Dio mi pli kaj pli malkovras din. Mia percepto do ne estas io stabila, senŝanĝa ; mi trovas konstante novajn aspektojn, pri kiuj mi havis neniun ideon antaŭe, eĉ post la travivaĵo ĉi tie raportita.

Ĉio ĉi estas granda mistero, ĉu ne ?

■ *En la historio de "Tien", la ĉefpersono unufoje renkontis gardanĝelon : ĉu vi mem renkontis gardanĝelon ?*

Mi havas bonan rilaton kun mia gardanĝelo. (Mi uzas singularon kvankam ŝajnas ke **pluraj estaĵoj – eble eĉ multaj – ludas tiun rolon**). Mi ne scias ĉu la vorto "renkontis" taŭgas. Mi perceptis ĝian agadon.

■ *Kiel vi perceptis ĝian agadon ?*

Jen ekzemplo. Kiam mi estis 25-jara, aperis anonco ke UNO volas dungti tradukistojn. Mia nivelo tute ne estis profesia, multe mankis ĝis tio. Tamen mi sentis fortan kaj **nekompreneblan impulson** kandidatiĝi.

La dungado okazis surbaze de konkurso. Kiam mi alvenis por la konkurso, mi eksciis ke **enskribiĝis 250 kandidatoj**. Mi aŭdis ilin paroli inter si (multaj jam konis sin reciproke), kaj konstatis ke preskaŭ ĉiuj estas pli aĝaj ol mi kaj havas universitatan diplomon pri la angla (kion mi ne havis). Ili aspektis kiel pli seriozaj kandidatoj.

La konkurso konsistis el francigo de angla teksto. Estis kelkaj vortoj kiujn mi ne komprenis. Dank'al la kunteksto mi sukcesis diveni la probablan sencon de ĉiuj, krom unu. Restis do unu frazo kiun mi povis traduki en du sinkontraŭdiraj manieroj. Nenio ebligis diveni ĉu ĝi signifas tion, aŭ la malon. Ĉar mi ĉiaokaze ne imagis sukceson ebla, ne gravis al mi. Mi elektis unu el la du ebloj hazarde kaj decidis ke mi sufiĉe penis super tiu teksto.

Mi do komencis paŝi por redoni mian folion. Tiam mi sentis kvazaŭ mano tuŝus mian ŝultron, kaj voĉo flustrus : "reiru al via loko, forstreu tiun frazon kaj metu la malon de tio kion vi elektis." Mi turnis min. Staris neniun malantaŭ mi.

Mi faris laŭ tiu **stranga instrukcio donita de neniun videbla**. Eble mi precizigu ke tio okazis la daton de mia naskiĝtago. Post kelkaj monatoj mi estis ĉe UNO, en Novjorko, kiel tradukisto.

Mi poste diskutis kun unu el tiuj kiuj selektis la kandidatojn surbaze de tiu traduko. Mi tiel eksciis ke la unua kriterio estis : perfekta redono de la senco de la teksto. Mi diris al li : "Do, se mi enmetus eĉ nur unu frazon kiu estus mistraduko, mi estus forĵetita, ĉu ne ?" Li diris al mi : "Efektive, pro nur unu miskompreno vi ne estus selektita".

Multo en mia vivo estus alia se tiuepoke mi ne iĝus UNO-tradukisto en Novjorko. Por mi ne estas dubo ke mia gardanĝelo intervenis.

Mi povus citi aliajn okazojn, ekzemple pri absolute neprobabla **evito de aŭtoakcidento**, aŭ similaj aferoj. Sed ĉi tiu espereble sufiĉos.

■ *Kion vi pensas pri karmo kiel la pedagogio de Dio ?*

Mi kredas je karmo kiel dia pedagogio, sed mi konstatis ke la karmokoncepto tre ofte estas miskomprenata kaj misuzata. En Hindio ĝi fariĝis preteksto por eviti ĉian socian helpon al mizeruloj (: "ili ja suferas pro sia karmo, estus malutile helpi ilin").

(Sekvote ?)

Intervjuis : **Hokan Lundberg**
("Piron konsentis pri publikigo.")

Noto de la Red.

* La hesiki-ano Kalisto "la Rifuĝulo" (Καλλιστος Καταφυγιωτης, 14-a jc.) ankoraŭ pli radikale skribis :

"La spirito miras pri ĝi* kiel pri la esto **pli ol luma, pli ol bona, pli ol saĝa, pli ol potenca**."

* "La kaŝita Unu, pli alta ol la esto". (*Philocalie*, 1995, II, p. 757 : *Pri dia unuiĝo kaj kontempla vivo*, 45.)

Leteroj

Estimata samideano, Lagos, 22-7-1999

Graco, paco kaj beno de Kristo estu kun vi.

Mi tre ĝojis kiam mi ricevis *Asistilon*. **Mi tre ĝojas ke tia ĉi gazeto ekzistas en Esperantujo.**

(...) Amo estas la ĉefa afero pri kiu temas en la Biblio. La tuta Biblio povus esti resumita tiel ĉi : "*Amu Dion, amu kunhomojn!*" Do ne gravas kiom religiema homo estas : tiu ne servas Dion se li ne amas kunhomojn.

(...) Mi estas evangelia kristano, kaj pri tio kaj aliaj temoj mi **volas rilati** kun ĉiuj homoj. Mi kredas ke **mi estas indiĝeno de la mondo**, ne nur de mia naskiĝurbeto. Mi do revas viziti aliajn landojn, iom labori kaj fondi eldonejon.

Mi volas esti membro de ASISTI ; kaj mi promesas ĉiam kunlabori pri ĝia organo : mi nur bezonas scii ĉu miaj poemoj kaj artikoloj trovas lokon sur unu el ĝiaj paĝoj. Kun samideana saluto

Olúwábùnmi Gabriel Oshó-Dauies

(96 Olaiya St., Mafoluku Oshodi, Lagos, Niĝerio)

R. : Bonvenon al vi kaj viaj poemoj kaj artikoloj !

*Ĵetu vian religion en flamon
se ĝi ne pritraktas amon.*

*Malama afero
gvidas al infero.*

Kio gravas

Kara kunhomo,

Eble iam ĉi-monde ni renkontos kaj do pri ni reciproke rakontos ; sed bonvolu tiam ne diri al mi (alie mi ne ja aŭskultos al vi) kia la religio via estas.

Ke vi kunhom' estas, nur tio gravas ! Mi eltrovis ke religi' ne savas se al tio mankas la virto amo : al nov-naskintino, se mankus mammo, kiom valora estus ties beb' ?

Ne gravas al mi via religio ĉar en tio ne ja troviĝas Dio : per amo Li vestiĝas, vivas en ĝi. Vidu, tuŝu Dion se plaĉas al vi : vi jam devas ami viajn kunhomojn.

Iam renkontante min, amon montru : nur tiel la religion demonstru ; mi do ne de vi bezonos ekpeti kia via deveno, por jam meti miajn sekretojn en viajn orelojn.

Ĉu mi vin vundis ? Bonvolu pardoni !

Kara Estimata samideano, Tehran, 7/10/99

Elkorajn kaj varmajn salutojn. En mia lasta poŝtkarto mi demandis de vi kiel mi povos [daŭre] ricevi vian karan bultenon *Asistilo senpage*. Alimaniere : pro malfacilaĵoj por transsendi valutojn el nia lando. **Anstataŭ respondi** en via lasta n-ro aŭ per poŝtkarto, **vi skribis mallongan kvazaŭan sekret-mesaĝon** sur la ĉirkaŭbendo de la bulteno, apud mia adreso : "*(Interŝanĝe kontraŭ libroj)*".

Mi plendas kial vi ne respondas al mi per letero aŭ poŝtkarto, aŭ sub rubriko *Leteroj* en via bulteno ?

Mi sendis du Esperantajn librojn verkitajn de iranaj Esperantistoj kaj eldonitajn en Irano (...) Mi trovis nur ĉi tiujn du librojn [*vidu sur lasta paĝo*]. Mi esperas ke ili plaĉos al vi, kaj ankaŭ estos akceptataj de vi anstataŭ abonpago ! [*Jes, dankon !*]

Antaŭe, mi tre dankas vian afablon, kaj esperas ke ĉi-foje vi sciigos al mi la ricevon de la libroj per letero aŭ per respondo sub rubriko "Leteroj".

Senpacience mi atendas venontajn n-rojn de la bulteno, kaj vian respondon ! Samideane via

Kambiz Ghadiri

R. : *Elkoran dankon pro viaj poŝtkarto, letero kaj sendo de libroj. Mi pardonpetas pro mia nur tri-vorta respondo ! Sed bonvolu legi ĉi-malsupre.*

Al ĉiuj legantoj (kaj skribintoj) !

Pro la rabatitaj poŝtaj tarifoj por gazetoj mi ne rajtas aldoni manuskriptan personan mesaĝon en ies ekzemplero (...eĉ se iam mi fojfoje tion faris !). **Mi rajtas nur 5-vortan laŭtipan administran informon kiel : Bonvolu reboni, mi petas, aŭ Via abono finiĝis per ĉi-numero, sen eĉ rajti saluti aŭ danki, kion mi ege bedaŭras : stulta regulo !**

Pro la granda nombro de ricevitaj leteroj, pro kiuj mi ĉi tie dankas vin ĉiujn !, mi ne povas aparte respondi al ĉiu, sed petas kaj varme kuraĝigas vin daŭrigi : nur tiel, per interŝanĝo inter la redaktoro kaj la legantoj, tra iliaj reagoj, revuo vere vivas. Sed kompreneble mi neniam reproduktas en *Asistilo* administrajn leterojn kiuj tedus aliajn legantojn. (La ĉi-supra estas escepto).

Ankoraŭ pli grave por la vivo de revuo estas la abonoj ! Certe pli multaj povus sendi monon sed simple forgesas aŭ ne komprenas kial ili devas tiom pagi : por nepagipovuloj ...aŭ nepagemuloj ! Nia entrepreno ne estas moncela, kaj ne postulas unue monon kontraŭ nur posta sendo, sed ĉiu bonvolu esti justa kaj akurate pagi kiom li povas. (Lastjare la red. devis kovri ĉ. 2.000-gld deficiton.)

La Serio pri Gilgameŝ :

(Jam simila antaŭepopea sumera mito "versajne kovris per vualo el legendo antikvan katastrofon en Uruk".)

(Gilgameŝ') hararon sian lavis ;
li harbendon puran metis
kaj li ĵ[etis] malantaŭen
siajn buklojn sur la dorson.
Li demetis ja malpurajn vestojn siajn
por surmeti freŝajn,
sin envolvis en tunikon larĝan
kaj per skarpo ligis ĝin. (ĉe la talio).
Kiam li surkapen
estis surmetinta sian kronon,
Iŝtar-la-Princino levis la okulojn
al la (fascinante) bela Gilgameŝ'.
"Nu, Gilgameŝ', edziĝu kun mi !
kaj donacu al mi cian frukton :
estu mia edzo,
estos mi edzino cia !
Mi ekipos (cin)
per lazurŝtona, ora ĉaro,
– kun pur-oraj radoj,
kaj el-ambraj brid-gvidiloj,
aljungita je "tempestoj" :
grandaj muloj –
por cin enkonduki en Palacon nian,
en arom' de cedro !
Kiam
ci penetros tien,
la plej gravaj [altra]nguloj de la klerikaro
kisos ciajn manojn, (eĉ) piedojn¹ !
Ĝis la ter' kliniĝos antaŭ ci
la reĝoj, la sinjoroj kaj la princoj !
Al ci ili portos la produktojn
el la lando kaj el la montar' [tri]bu[te].
El kaprinoj ciaj ĉiu naskos triĝemelojn,
el ŝafinoj ciaj, ĉiu du ĝemelojn ;
kaj azenoj ciaj pri la ŝarĝ' superos
plenkreskintajn mulojn ;
ciaj ĉarĉevaloj
en vetkur' triumfos ;
kaj sub la jungaĵo
[ciaj bovoj] estos senegalaj !"
Malferminte sian buŝon kaj ek[par]olante,
[alparolis li] al Iŝtar-la-Princino :
"[Kiom devos dote pa]gi [mi al ci],
se mi edziĝos kun ci ?
Ĉu por cia korpo [ne bezonos ci]
kaj vestaĵarojn kaj[parfumojn] ?
[Ĉu ci ne bezonos]
proviantojn kaj nutroprovizojn ?
[Ĉu ne devos mi cin nutri] per festenoj diaj,
[cin malsoifigi] per trinkaĵoj reĝaj ?

(. . .) [Ĉu ne devos mi envo]lvi [cin]
en pelerinon [peltan (?)] ?
[N]e ! ne volas mi [edzinon]
tian kia ci !
[Ci estas forno]
[kiu estin]giĝas ĉe l' malvarmo ;
pord' misfermiĝe[ma,]
[ha]ltiganta nek la ventojn nek (eĉ) la blovetojn ;
palacaĉo kiu (dispremante) fa[las]
[sur] la (plej) kuraĝajn [defendantojn (?)] siajn ;
elefanto [forĵetanta]
sian (baldakenan) dorsoseĝon ;²
bitumaĵo
kiu ma[lpurigas] tiun kiu tuŝas ĝin ;
felsak' (likega)
kiu [malpleniĝas sur] portanton sian ;
(pulvorema) kalkoŝtona blok' kaŭzanta
la disfalon de ŝtonmuro ;
murrompilo disbatanta la muregojn
de nemalamika lando ;
ŝuo
vunde dol[oranta] la uzanton !
Eĉ ne (estis) unu el amintoj [ciaj]
[kiun estis ci amonta] ĉiam !
Eĉ ne unu cia favorat'
eskapi povus [el kaptiloj ciaj] !
Venu tien ĉi, ke mi recitu [al ci]
[la malbonan sorton] de amintoj ciaj ! (. . .)
Tammuz, la karulo de ju[nec]o cia :
al ĉi tiu atribuis ci priplorindaĵon ĉiuĵaran !
Tiu multkolora bird', Alalu* :
ci ĝin amis, (*Akade allallu : koracio ?)
(kaj subite) ci ĝin batis,
kaj flugilojn ĝiajn rompis ci !
kaj jen ĝi enarbare rifuĝinta
kaj pepanta : "Kappi³ : (aj!) flugiloj miaj !"
La Leono senegale forta :
ci ĝin amis,
(kaj subite) ci ne ĉesis konstruigi kontraŭ ĝi
kaptilojn kaj kaptilojn !
La Ĉeval', pasia por bataloj :
ci ĝin amis,
(kaj subite) ci aljuĝis al ĝi
la plurpintan, plurrimenan Vipon ;
ci kondamnis ĝin
al kuradegoj, pli ol kvindekkilometraj,
(ĝin kondamnis) trinki nur post kiam
ĝi (la akvon) malpurigis (hufe ĝin tretante)⁴ !
Ci eĉ funebrigis
Silili', patrinon ĝian !

la Ĉiela Virbovego (6-a Tabuleto)

La Paŝtiston amis ci,
la Ĉefŝafiston
[kiu] kun fervor' kuiris macojn sub la cindro,
kaj oferis [ĉi]utage siajn [ka]prinetojn ;
(kaj subite) ci lin batis
kaj lin faris lupo,
tiel ke servantoj liaj propraj persekutas lin
kaj hundoj liaj lin ŝirmordas ĉe l' postaĵo !

Iŝullânu-n amis ci,
la ĉefprizorgiston de l' ĝardeno patra,
kiu donacadis al ci korbojn da daktiloj,
cin provizis ĉiutage per manĝaĵ' abunda.
Ci, ĵetinte la okulojn al li,
iris lin provoki (al amor') :

"Ni ĝuu cian fortikecon,
mia Iŝulaĉjo !
Nu, antaŭenigu cian manon,
tuŝu (kaj ekmanĝu) mian vulvon !
(Mi tremetas,
kovru min per varmaj kisoj !)"

Sed cin diris Iŝulanu :
"Kion do ci petas de mi ?
Ĉu patrino mia ne kuiris ?
Ĉu mi ne (jam) manĝis (bulkojn) ?
Manĝo cia estas nur (malbona) pano,
kaj malbena, ne(tuŝ)inda ;
kontraŭ la malvarmo,
(cin do) kovr(u ci mem per vestaĵo) !" ⁵

Tiam ci, aŭdinte lin pa[roli] (tiel),
ci lin batis kaj lin faris bufo (?),
(porĉiame) lin restadigante
ĉe (la loko de) laboro lia (...)

Se (do) ankaŭ min ci amos,
[min] ci [traktos] kiel ili !"

Kiam ĉion ĉi ŝi [aŭdis],
furioza, Iŝtar enĉielen gri[mpis],
kaj ŝi iris [plori]
antaŭ [sia "patro" ⁶] Anu,
kaj ŝi lasis [flui siajn larmojn]
antaŭ Antu, sinjorino sia :

"Patro mia,
Gilgameŝ' per hont' min kovris !
Gilgameŝ' recitis are al mi h[on]tindaĵojn,
hontindaĵojn kaj malb[en]ojn !"

Sed Anu', la buŝon malferminte kaj ekparolante,
alparolis Iŝtar-la-Princinon :

"Nu, ĉu ci ne
incitegis [Gilgameŝ']-la-re[ĝon] ?
Jen (do certe) kial li recitis al ci hontindaĵojn,
hontindaĵojn kaj malb[en]ojn !"

Iŝtar, malferminte sian buŝon kaj ekparolante,
alparolis [sian "patron" Anu] :
"Kreu por mi la ĉielan Virbovegon, Patro mia,
[por ke mi mortigu Gilgameŝon,]
kaj ke mi br[ulig]u
[lian Restadejon] !
Se ci ne do[naco]s al mi
[(tiun) Virbovegon], (...)
direk[tinte miajn paŝojn]
[a]l la Region' Infera,
[mi r]esuprenigos la mortintojn,
kiuj voros la v[iv]antojn ;
kaj mi multobli[gos] la mortintojn
malprofite la vivantojn !"

A[nu, malferminte sian buŝon] kaj ekparolante,
alparolis Iŝ[tar-la-Princinon] :
"Se [de mi] ricevos
ci [la Virbovegon],
(estos) [por] la land' de Uruk
(malsateg' dum) sep "(nur)pajlaj" jaroj !
[Ci] (unue) devus ama[sigi grenon (?)],
[a]bundigi la verdaĵon !" (vd Gn 41,17-36)

[Iŝtar, malferminte sian buŝon] (kaj) ekparolante,
[alparolis] sian "patron" [Anu] :
"[Patro mia,]
[mi plenum]is (jam konsilon) cian :
Mi starigis [jam grenejojn multajn (?)]
[antaŭvide al (?)] [la Sep] (nur)pajlaj jaroj,
(kaj) [mi ama]sigis [grenon (?)],
[abundigis] la verdaĵon ! (. . .)"

Kiam Anu estis de Iŝtar' [aŭdinte]
ti[un ĉi deklaron (falsan ?)],
al ŝi [donis] li
[la lon]ĝon de la Virbovego ;
[kaj Iŝtar', en man' tenante tiun],
ĝin kondukis [kun si],
[ĝis alvenis ili]
en la [centron m]em de Uruk (. . .)

1/ Nineva v. : *piĉojn* ; "Msk 7498n+" (Emar, 13-a jc aK) : *manojn*. Anstataŭ ekskludi unu mi kunigis ambaŭ.

2/ Mezopotamoj do jam konis tian uzon, ŝajne propre hindan. (Nenia spuro pri tia uzo aŭ besto en Mezopotamio.)

3/ Etiologia vortludo pri la birdokrio : akada ekvivalento de nia "kvivit", la onomatopea *kappî* ankaŭ signifas : "miaj flugiloj".

4/ Etiologia rakonto, ĉar kiam ĉevaloj eniras marĉon por trinki, de la tretita fundo suprenvenas koto. Oni ne nion scias pri ĝi kaj ĝia "patrino" : etiologio de kulto ?

5/ Mi ne sukcesis trovi ekzaktan ekvivalenton de ĉi tiuj netradukeblaj vortludoj, sed konservis la spiriton.

6/ Respektvorto. Ŝi ne estis lia filino sed amantino.

Ĉe l' skuiĝ' (unua) [de la Bov']
 fendego malfermiĝis,
 kaj du centoj, eĉ tri centoj da loĝantoj de Uruk'
 enfalis en ĝin,
 (jes), du centoj, eĉ tri centoj da loĝantoj de Uruk'
 enfalis en ĝin !
 Ĉe l' skui[ĝo] dua
 malfermiĝis ja fendeg' alia,
 [kaj du centoj, eĉ tri centoj da loĝantoj de Uruk']
 [enfalis] en ĝin,
 (jes), du centoj, eĉ tri centoj da loĝantoj [de Uruk']
 [enfalis] en ĝin !⁷
 Ĉe l' skuiĝo tria
 tute apud Enkidu' [fendego malfermiĝis] :
 li enfa[li]s en ĝin
 ĝistalie !
 Sed li (tuj el)saltis
 kaj li kap[tis] la Virbovon je la kornoj.
 Rezistente al li, la Virbovo bav[is] de antaŭe,
 kaj de sub la vost' fekaĵon [lasis fali] !
 Enkidu' la buŝon malferminte
 kaj [ekparolante],
 alparolis [Gilgameŝon] :
*"Ho amiko mia, ni kun glor' revenis
 [el la Arbareg' de l' Cedroj (?)].
 Sed nun kiel ni alfrontu
 [tiun novan danĝeregon (?)] ? (. . .)"*
 (Tiam) Enkidu' [per]sekutante la Virbovon,
 ĝin [atingis (?)]
 kaj (ĉi-foje) [firme (?)]
 [kap]tis [ĝian v]oston. (...)
 Kaj Gilgameŝ, kiel [kuraĝulo]
 brava (...),
 [penetrigis] sian tranĉilegon
 inter kol' kaj kornoj, [ĉe la nuk]o de l'Virbovo!
 De la faligita Virboveg'
 la ko[ron] ili (tuj) elŝ[iris],
 kaj ĝin metis antaŭ Ŝamaŝ.
 Poste, (iom) malproksimiĝinte,
 ili (ĝis la ter') adorkliniĝis antaŭ tiu dio,
 kaj sidiĝis ambaŭ,
 flank'-ĉe-flanke.
 Sed Iŝtar', suprenirinte
 sur la Uruk-ĉirkaŭmuron,
 (tuj) surmetis la funebrian vestaĵaron,
 kaj ŝi ĵetis longan plendon :
*"Gilgameŝ' malhonoris min,
 la Virbovegon mortigante !"*
 Enkidu', aŭdinte
 tiujn ĉi parolojn de Iŝtar',
 piedon de la Virboveg' elŝiris,
 kaj al la vizaĝo ŝia ĵetis ĝin (dirante) :
*"Se mi cin nur kaptus, al ci ankaŭ mi simile farus !
 mi pendigus ĝiajn tripojn de sur ciaj brakoj !"*

Tiam Iŝtar kunvenigis
 prostituitinojn kaj hetajrojn kaj ĝojigulinojn
 por celebri priploradon
 antaŭ la piedo de la Virbovego !
 (Poste) Gilgameŝ' kunvokis
 ĉiujn primetalajn metiistojn kaj manlaboristojn,
 kiuj laŭdis la dikecon
 de la kornoj de la Virbovego ;
 al ilia maso lazurŝtonoj (estis alfiksataj) :
 tridek kilogramoj !
 Kaj sur ilin oni plakis (oron) :
 unu (tutan) kilogramon !
 Kaj enhav' ilia, (ambaŭ kune),
 estis preskaŭ dumil-litra !
 Gilgameŝ' oferis ilin por enteni la unĝventojn
 de la propra dio lia, Lugalbanda⁸ :
 ilin do enkondukinte en la (templan ?) Ĉambron
 de la Ĉef' de (sia) Familio,
 tie li pendigis ilin !
 (Poste, Gilgameŝ' kaj Enkidu') purigis siajn manojn
 en l' Eŭfrato ;
 kaj promene, kune,
 ĉare ekveturis en la stratoj de la urbo,
 sub rig[ardoj]
 de la (ge)loĝantoj de Uruk' amasiĝintaj !
 Kaj Gilgameŝ di[ris]
 al la inoj kiuj servis en P[alaco] lia :
*"Kiu estas
 la plej bela el la viroj ?
 Kiu estas
 la hero' la plej glorinda ?
 La plej bela el la viroj :
 G[il]gameŝ' !
 la plej glorinda :
 Enkidu' !
 [Kaj pro] kolero [j]etis [ni]
 [piedon de la Virbovego] al Iŝtar' :
 [(kaj) ŝi ne trovis] iun en la urb'
 por ŝin konsoli ! (. . .)"*
 Kaj Gilgameŝ
 orga[ni]zis en Palaco sia
 (grandajn) festojn !
 (Poste, dum) la Viroj dormis
 kuŝe en la litoj,
 Enkidu', endormiĝinte,
 vidis sonĝon,
 kiun ĉe l' vekiĝo
 li rakontis
 al amiko sia
 jene.

(Fino de la Tabuleto VI)

7/ Laŭ skribkutimo plurajn frazojn anstataŭigas "same".
 8/ Diigita patro de Gilgameŝ.

Impresoj pri islamo en Bosnio *

(...) Dum la milito en Bosnio (1992-1995), multaj turnis sin al religio. *"Mi ne sciis ke mi estas islamano, diris pluraj, ĝis oni komencis pafi al mi : ĝis mi komprenis ke oni volas mortigi min nur pro tio ke mi estas islamano."*

Kiaj islamanoj ili estas ? Demandu, kaj ofta respondo estos : *"Ni estas eŭropaj islamanoj. Nia islamo estas moderna islamo."* (...)

Moderna islamo ? Al multaj okcidentanoj, religio ĝenerale kaj islamo aparte, ŝajnas ĝuste antitezo de moderneco. (...)

Kaj **eŭropaj** islamanoj ? Alia antaŭjuĝo estas ke islamo estas fremdaĵo en Eŭropo, kaj kiel ĉio fremda, timiga. En okcidenta Eŭropo, islamanoj estas antaŭ ĉio enmigrintoj de post la dua mondmilito (sed ne forgesu la altan islaman civilizacion sur eŭropa sojlo : *Al-Andalus* !). (...)

Serbaj kaj kroataj naciistoj simple identigas nuntempajn bosniajn islamanojn (kiuj estas slavoj, kaj parolas esence la saman lingvon) kun la Osmanaj turkoj ; aŭ kun kristanaj prapatroj kiuj *"perfidis sian kredon kaj nacion"* transirante al la religio de la konkerintoj. Samtiel, **ili asertis**, ankaŭ nunaj islamanoj pretas perfidi Eŭropon al fundamentalisma minaco de agresema islama mondo. Ĉio ĉi (ĉu necesas aldoni ?) **sen ajna bazo** en historio, en nuna realo, aŭ en simpla logiko.

(...) Malgraŭ la propagando : fundamentalistoj ili ne estis. (*"Kiaj fundamentalistoj ?!? Ni eĉ ne estis averaĝe bonaj islamanoj !"*, miris la muftio de Mostaro.) La reganta tendenco en bosnia islamo ĉi-jarcente estas modernisma, kiu volas reinterpreti islamon por trovi (ofte eŭropecajn) respondojn al modernaj problemoj.


Kaj hodiaŭ ? Jen la interesoj de eminentaj islamaj intelektuloj en nuna Bosnio : Enes Kariĉ, spertulo pri Korano, diras ke ĉiu generacio devas interpreti tiun libron denove el sia propra ekzistada starpunkto ; li ŝatas "multvoĉecon", kaj instigas islamanojn lerni kaj de sia propra, riĉa tradicio, kaj de la moderna okcidento. Fikret Karĉiĉ, spertulo pri islama juro, esploras kian rolon kaj statuson povas havi la sankta leĝo en sekulara ŝtato. Kaj Reŝad Hafizoviĉ, **kiu studis teologion parte en katolika seminario, serĉas** en la profundoj de mistika saĝeco la transcendantan **unuecon de religioj**.

Delonge la islamanoj substrekas elementojn de sia tradicio kiuj parolas pri toleremo, progresemo kaj liberaleco : ekzemple, ke katolika katedralo, serba** preĝejo kaj hebrea sinagogo staras kune kun moskeo ĉe la koro de Sarajevo.

* Mallongigita el *Bosnia Lilio*, n° 2 (1-1999), p. 8-9.

** Interesa, tia uzo por signifi *ortodoksan...* (Red.)

Toleremo de islamanoj kontrastas kun netoleremo de aliaj : *"Pli ol mil moskeoj sisteme, plane detruitaj en la milito ! Sed kie islamanoj kontrolis la terenon, neniu kristana preĝejo detruita !"* (...)



La oficiala islama komunumo provas, el nova kaj favora pozicio, trovi sian lokon en socia, kultura kaj politika vivo, je oftaj protestoj el aliaj partoj de la socio (aparte akris la reagoj kiam, dum milito, la islama komunumo kondamnis religie miksitajn geedzecojn). Estas ankaŭ **nova ĉeesto de diversaj tendencoj** el la islama mondo, kiuj provas disvastigi siajn **pli aŭ malpli ideologiajn versiojn de islamo**, kaj kies fremdaj islamaj moroj konfuzas kaj ĉagrenas multajn bosnojn.

Post ĉio ĉi, tamen, la ĉefa tendenco ŝajnas resti la deziro esti eŭropaj islamanoj, kaj emfazi toleremon, liberalecon kaj progresemon en islamo. En miaj kunparoladoj kun religie edukitaj islamanoj, preskaŭ ĉiam oni citis al mi jenan version el la Korano : *"Ho vi homoj ! Ni kreis vin el viro kaj virino kaj faris vin popoloj kaj triboj por ke vi ekkonu unu la alian (...)"* (*Al-Huĝurat*, 14), **do ne por ke ni batalu** unu kontraŭ la aliaj.

En iu poemo mi trovis verson kiu povus esti konkludo al tiuj ĉi impresoj, kaj iuspeca sumigo de sintenoj en bosnia islamo (...) Ĝin verkis eŭropa humanisto kun personaj spertoj pri konfliktoj kaj pogromoj en multkultura urbo :

*"Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj,
ni ĉiuj de Di' estas filoj"* (Zamenhof)

Christian Moe*

* Norvega esperantisto loĝanta en Slovenio. Teksto de lia prelego antaŭ sarajevaj samideanoj (21-11-98) pri la ĉefa temo de lia magistra tezo en **historio de religioj** : *La debato en la bosnia islama komunumo 1985-1991*.

Pasint-someraj aranĝoj

Jogo-semajno en Grésillon

La unua staĝo de **GiRiMa-jogo**¹ en esperanto okazis de la 8-a ĝis 14-a de aŭgusto en la (finance **subtenenda**) **esperantista kastelo Grésillon**, kun deko da partoprenantoj. Jen raporto de ĝia franca instruantino **Rose-Marie Laveau** :

Estis por mi la unua semajno de instruado en Esperanto. Mi tamen ne timis, ĉar mi sciis ke se la homoj ne komprenos mi povos montri. Plie, dum la kursoj ĉiuj devas resti silentaj ...mi do certis ke neniu demando ĝenos min !

Mi prenis miajn preparitajn kursgvidajn notojn kaj komencis ekspliki kion la lernantoj devos fari. Mi precizigas ke en GiRiMa-jogo mi ne ofte montras la pozojn. Tiamaniere la partoprenantoj devas bone aŭskulti. Tiel ili fariĝas pli kaj pli atentemaj. Krome, ili ne povas imiti modelon : tio tre efikas por retrovi sentokapablon de korpa skemo.

Ĉiuj ŝatis bone spiri, sin rilaksi, memmasaĝi kaj malstreĉiĝi. Kun po du kursoj ĉiutage la praktikantoj rapide progresis. Ili ankaŭ malkovris vortrezoron pri la homa korpo. Fakte, mi ne povis longe uzi miajn preparitajn notojn ĉar mi devis adapti la ekzercojn laŭvice, por ke ĉiuj progresu. Mi do preskaŭ tuj improvizis.

Mi tamen observis ke almenaŭ unu virino ne plene sukcesas sin rilaksi. Kiu? Mitu². Kial? Ofte kiam mi uzis *per*, *por*, *pro*, *pri*, mi eraris. Ĉiufoje kiam mi eraris mi rimarkis diskretan streĉiĝon sur ŝia vizaĝo. La aliaj ŝajnis ne konscii pri la eraro, sed Mitu vere suferis.

Nu, Mitu, mi promesas al vi sekvi la perkorrespondan E-kurson de J. Vincent³. Venontjare mi do malpli eraros kaj vi finfine povos vere malstreĉiĝi ! La plej grave estas ke ĉi-jare la staĝantoj en Grésillon povis jogumi. Kaj tio okazis.

Dankon al ĉiuj kaj i.a. al Pŝemek, kies E-kurso ne estis malgaja. (Mi komprenis, dank'al li, la diferencon inter *posttagmeze* kaj *postajmeze*...)

Gratulojn al la tuta skipo [de organizantoj kaj prizorgantoj de la kastelo]. Ĝis la venontjara dua semajno de GiRiMa joko en Grésillon. □

(*Notoj de la Red.*)

1/ El : **Gimnastiko, Rilakso, Masaĝo.**

2/ Marie-Thérèse Lloancy, komitatanino de tiu ĉi *Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj*. Ŝi doktoriĝis pri la vortludoj en la E-verkaro de R. Schwartz.

3/ Ankaŭ kasistino de la E-Kulturdoma kastelo, kies **bankkonto** estas : "*BPBA Nantes 58019025709*". ...Vi povas sendi viajn donacojn al *Grésillon*, 49150 Baugé.

Interreligia preĝoro en Berlino

Okaze de la Universala Kongreso, kunvenis sepdeko da homoj el plej diversaj devenoj religiaj kaj naciaj, en la preĝejo "*Am Lietzensee*", ne for de la kongresejo.

En fratece spirita etoso sonis sanktaj vortoj el la Biblio, la Korano, la Bhagavad-Gito, budhisma Sutro, bahaa *Preĝo de la Unueco*, oomota *Tankao pri Esperanto*, kaj *Preĝo sub la verda standardo de Zamenhof*. Post komuna fina kanto ĉiuj povis ĝui amikan interbabiladon, ĉe malgranda bufedo preparita de disĉiploj de *Ŝri Ĉinmoj*.

La aranĝo (anoncita en n-ro 23 p. 26) estis organizita de *Bahaa Esperanto-Ligo* kaj de la loka sekcio de la *Monda Konferenco pri Religio kaj Paco* (WCRP) ; kaj kelkaj ASISTI-anoj aktive partoprenis en ĝi. (*Laŭ raporto de Eric Coffinet*)

(Ankaŭ kelkaj reprezentantoj de religioj estis komune intervjuataj ĉe loka televido, sed pro teknikaj malfacilaĵoj, finfine nur germanlingvanoj restis invititaj.)

Antaŭ 50 jaroj :

Instituto por Religiologio, kaj Tutmonda Federacio de Religioj

" En Polujo formiĝis organiza komitato por *Tutmonda Federacio de Religioj* (ankaŭ ne-kristanaj) kaj por *Internacia Instituto por Religiologio* (por sciencaj esploradoj en la kampo de sistema religiologio, psikologio, sociologio, kaj historio de la religioj). Oni serĉas adresojn de sciencistoj (kulturologoj, historiistoj, psikologoj, sociologoj, teologoj ktp), kiuj dezirus aniĝi al la Instituto kaj kunlabori kun ĝi. La Instituto intencas uzi Esperanton en sia korespondado kaj en siaj eldonadoj. (Prof. W. Jezierski, 4/22, Słoneczna str., Kraków 1, Polujo)."

Kiu leganto povos kaj **bonvolos sendi informojn** pri la eventualaj sekvoj de tiu ĉi anonco ?

* *Scienca Revuo*, vol. 1-a, n-ro 1-a (15-3-1949), p. 6.

Kara frato Christian, Heemskerk, 2-7-1999

Tre mi dankas vin, ke vi publikigis tradukon mian de "*La heliantoj*...". Mi metos ĉi tiun numeron en la sidĉambron de la benediktanoj inter kiuj mi jam dum multe da jaroj volontulas kiel gastiganto, pordisto kaj kandelfaristo. (...)

La ĉielo riĉe benu vin, la viajn kaj vian noblan laboron, kiu estas nepre **farinda kaj farenda**. Pardonu ke ni *ne* abonas, ni urĝe bezonas "nian" monon por la necesaj projektoj de *Fonduso Evidente*.

Elkore salutas **Jacques [Tuinder]**

Supera Silezio, somere 1999 : Religia centro de Esperantujo

Okazis post la Berlina UK 1999 du gravaj eventoj je interreligia kaj ekumena naturo en Supera Silezio. En Kenĝejeno-Koĵlo (*Kędzierzyn-Koźle*) estis la 5-a *Interreligia Seminario Esperantista* (ISE) inter la 8-a kaj 13-a de aŭgusto, organizita de ASISTI. La celo de ĉi tiu ISE, kiel de ĉiuj, estis provizi forumon por tolerema kaj kunlaborema dialogo inter anoj de diversaj religiaj kaj spiritaj tradicioj pere de esperanto.

Dek partoprenantoj ĉeestis, el Brazilo, Francio, Usono / Tajvano, Pollando kaj Norvegio. Por tiaj seminarioj tio estas iom modesta homkvanto, sed ne neakcepteble malgranda, kaj la etoso estis aparte intima. La partoprenantokvanto estas atribuinda al iom malfrua dissciigo, relative malgranda partoprenado de lokanoj kaj regionanoj kompare kun iuj antaŭaj ISE-oj, kaj, ĉefe, la konkurenco, por potencialaj kristanaj partoprenantoj, de la najbara kaj samtempa *Ekumena Kongreso*.

La kvalito de la evento estis tamen sufiĉe bona. La konstantaj partoprenantoj ĉiutage sidis en silento sub la gvidado de kvakera spertulo, s-ro Douglas Draper el Norvegio. D-ro Christian Lavarenne, el Francio, prelegis pri la historio de interreligiaj organizaĵoj ĉirkaŭ la mondo. Siavice Bradio Moro de Kenĝejeno, kiel Prezidanto de *Universala Tao-Stud-Ligo Esperantista*, prezentis serieton da prelegoj pri la taoisma tradicio kaj konceptaro de *Lao-tzu*.

Okazis ankaŭ interreligiaj diskutoj pri la koncepto de la justa milito konsiderante la Kosova krizo, kaj pri la **estonteco de religio** en la nova jarmilo. La vizitanta Brazila komunumano, el la komunumo *Nova Erao*, diris multe pri la vivo en spirite orientigita komunumo, spiritismo kaj la evoluo de la propraj spiritaj kredoj kaj tiuj de Brazilanoj ĝenerale, kaj plie prezentis belegan muzikon en malpli formalaj momentoj.

Krome oni kune rigardis imponan naturan fenomenon ne sen spirita signifo, la sunan eklipson. Kaj tion farante antaŭ la seminariejo oni renkonti-

Tao *przeciw nienawiści*

Seminarium odbyło się w dniach 8-12 sierpnia. Jego organizatorem był Amerykanin Bradius Maurus, prezes Universal Tao Study Ligue Esperantists, taoista od ośmiu lat mieszkający w Kędzierzynie-Koźlu.

Uczestnicy seminarium rozmawiali na temat historii taoizmu oraz jego najważ-



Bradius Maurus (pierwszy od lewej) obserwuje zaćmienie słońca, które miało miejsce akurat w czasie seminarium

niejszej książki pt. „Tao Te Ching”, napisanej przez Lao-tzu.

Jak nam powiedział Christian Lavarenne, uczestnik seminarium z Francji, sekretarz International Association for the Study of Spiritual and Theological Tao-ching (ASISTI), pomimo

Parto el artikolo pri la ISE, aperigita en la ĵurnalo de Kędzierzyn-Koźle "Gazeta lokalna"

ĝis kun stabanoj de loka ĵurnalo, kio rezultigis **ŝancon loke propagandi Esperanton** : en la lasta tago de la Seminario du ASISTI-anoj, estis intervjuataj de tiu gazeto kaj la rezulto aperis kun bela foto en la ĵurnalo [vidu en la ĉi-supra enkadritaĵo], bona propagando pri la seriozaj fak-uzoj de Esperanto.

Ekumena Kongreso

Ankaŭ sukcesa* estis la 14-a Ekumena Kongreso en Gliwice (*Gliwice*), okazanta samtempe. Ĝi estis la 52-a de **IKUE**, la 49-a de **KELI**, kaj la 3-a *Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro* (**JET**).

Sub la precipa loka gvidado de s-ro Stanislavo Mandrak, Prezidanto de Pola Esperanto-Ligo, en kunlaborado kun pastoro Adolf Burkhardt kaj sacerdoto Bernhard Eichkorn el Germanujo, ĝi allogis ĉ. **250** registritajn **partoprenantojn**, kaj protestantajn kaj katolikajn, kaj eĉ ortodoksajn kaj kvakeran. La ISE-anoj el Kenĝejeno vizitis la EK en la unua tago, ĉar ekzistis formalaj kunlaboraj rilatoj inter ambaŭ religiaj eventoj, kies organizantoj reciproke interŝanĝis bondezirojn por la du kunvenoj.

Bradio V. Moro

* Kvankam iuj diris ke la katolika influo iom tro pezis.

Eklipsoj kaj Biblio

Inter la suna eklipso je la 11-a de aŭgusto 1999, kiu estis komune spektata de la Interreligi-Seminarianoj (vidu la raporton de B. Moro) kaj la luna eklipso kiu okazos en la nokto je la 21/22-a de januaro 2000, la redaktoro petis artikolon de **Christophe Yono Lanier**, la aŭtoro de la (francilingva) verko *La eklipsoj : mitoj kaj simboloj* (Paris : Ed. de l'Adret, 1999, 256 p., ISBN 2-907629-57-7). Jen do kion li afable sendis, tradukita de Jacqueline Gonin (krom la bibliaj eltiraĵoj, ĉerpitaj el la kutima E-traduko), sed reviziita kaj mallongigita de la Red., kiu aldonis klarigajn kaj komentajn notojn aŭ parentezojn inter rektaj krampoj.

Eblas ke la Biblio, kaj ankaŭ sanktaj libroj de aliaj religioj, fojfoje aludas al naturaj fenomenoj kiam ili priskribas ĉielajn eventojn. Tiuj priskriboj, evidente simbolaj, povus tamen esti bazitaj sur astronomiaj observoj.

Aludoj en la Unua Testamento

Bibliaj tekstoj mencias multajn ĉielajn fenomenojn, el kiuj iuj elvokas pli-malpli klare eklipsojn. Ekzemple :

– laŭ **Jeremia**, la Eternulo diras : "Mi rigardas (...) la ĉielon, kaj jen ĝi estas senluma" (Jr 4,23) ;

– la paŝtisto **Amos** : "Malluma estos ja la tago de la Eternulo, ne luma ; malluma sen ia brilo." ; kaj : "En tiu tago, diras la Sinjoro, la Eternulo, Mi subirigos la sunon en tagmezo, kaj Mi mallumigos la teron meze de luma tago." (Am 5,20 k 8,9).

En *La Agoj de la Apostoloj* (2,17-20) oni povas legi parolojn de la profeto **Joel** (2,28-31 ; 3,1-4 laŭ alia referenca sistemo), tiajn kiaj Petro citas ilin :

"Kaj en la lasta tempo, diras Dio, (...) Mi donos miraklojn en la ĉielo supre kaj signojn sur la tero malsupre : sangon, fajron, kaj vaporon de fumo ; la suno fariĝos malluma kaj la luno fariĝos sanga, antaŭ ol venos la granda kaj majesta tago de la Eternulo."

Estas facile interpreti tiun ĉi fragmenton kiel aludon al sun- kaj lun-eklipsoj. Fakte dum multaj luneklipsoj la luno alprenas koloron kiu ja aspektas iom ruĝa pro atmosferaj fenomenoj.

Kaj en la Nova Testamento

Oni retrovas tian priskribon en la *Apokalipso* :

"Kaj la suno fariĝis nigra kiel sakaĵo el haroj, kaj la tuta luno fariĝis kiel sango ; kaj la steloj de la ĉielo falis sur la teron..." (Ap 6,12-13)

En la *Evangelio* laŭ Mateo (24,29) oni povas legi :

"Tuj post la aflikto de tiuj tagoj la suno mallumiĝos, kaj la luno ne donos sian lumon, kaj la steloj falos el la ĉielo, kaj la potencoj de la ĉielo ŝanceliĝos."

Astronomo povus facile kompreni tiujn ĉi eltiraĵojn, kiel aludojn al du eklipsoj kaj pluvo de falantaj steloj.

De la "6-a" ĝis la "9-a" horo

Laŭ historiistoj Jesuo estis kucumata la 14-an (aŭ 15-an) de la monato *Nisan* (marto-aprilo). Pri la jaro ne estas tuta certeco. Oni plej ofte proponas 30 aŭ 33 (sed foje ankaŭ 27, 29 aŭ 34).

Nu, luneklipso okazis la 3-an de aprilo 33, vendredan vesperon kaj tagon de la juda pasko¹ ; kaj kelkaj, [ne nur] pro tio, deduktis ke tiu estis la tago de la Krucumado. Sed kiam oni legas la Evangeliojn, ŝajnas ke temus pli ĝuste pri suneklipso.

La Evangelio laŭ **Johano** [kiu *vidis mem* la krucumadon, laŭ Jn 19,35] ne mencias la jenon, sed la tri aliaj evangeliistoj indikis, ke dum la Pasiono, ek de (aŭ : "de post") la 6-a [= 12-a] horo : "fariĝis mallumo sur la tuta lando ĝis la 9-a" [t.e. la 15-a]. [Nur] **Luko** [kiu nur raportas laŭ aliaj : Lk 1,2] eĉ aldonas : ĉar "estis suneklipso" (23,44)².

Ĉu okazis suneklipso tiun tagon, aŭ ĉu la ĉielo malheliĝis pro densaj nuboj, aŭ ĉu la obskureco estis nur simbola en tiu rakonto ? (...)


Se efektive okazis totala suneklipso, nur unu dato eblus : **totala suneklipso videblis** iom norde de Jerusalemo la 24-an de novembro 29. Ĝi okazis inter la 9-a 35 kaj la 12-a 27, kun maksimumo je la 10-a 58 laŭ la loka tempo en Jerusalemo. (...)

1/ Daŭras de vendredo vespere ĝis sabato vespere.

2/ Ĉi-foje temas pri la pli fidela traduko de pastoro G. Berveling, ol la tradicia "ĉar la sunlumo mankis" ; laŭvorte : (pro) "la suno malaperanta" (του 'ηλιου 'εκλιποντος, *tiu heliou eklipontos*).

La sama radikalo estas uzita kiel en teknike precizaj jenaj frazoj, almenaŭ de Tucidido (5-a jc a.K. ; en 4,52) ĝis Diono Kasio (ĉ. 155-229 p.K. ; en 55,22) : του 'ηλιου 'εκλιπες τι 'εγενετο, *tiu heliou eklipes ti egeneto* : "de la suno eklipso ia [= ne totala] okazis".

La esperanta vorto *eklipso*, kvankam ne en la *Universala Vortaro* nek en la unua *Oficiala Aldono* (1908), tamen estas akceptita de Zamenhof (laŭ *Dict. complet Fr-Esp.* de E. Gorsjean-Maupin). Antaŭe (kaj daŭre, paralele) oni uzis la kunmetaĵon *mallumiĝo* (ekz-e en *Voc. Fr-Esp.* de Th. Cart, M. Merckens k P. Berthelot, Hachette, 1907⁵). La unua eldono de la esperanta *Nova Testamento* aperis la 18-an de decembro 1912, do eble la neuzo de *eklipso* ne estas mirinda.



Tiu ĉi armena bildo elvokas la Krucumajn eklipsojn.

Simboleco de la eklipso

Oni povas rigardi la mencion de tiu fenomeno laŭ simbola maniero : la suno eklipsita [aŭ opake vualita³] dum tri horoj, la Kristo eklipsita [aŭ envolvigita en mortotuko] dum 3 tagoj, kaj li reviviĝis samkiel la suno reaperis. Ĉar la dato de la sun-eklipso, 24-a de **novembro**, **ne povas korespondi** kun juda pasko, kiam Jesuo estis krucumata. (...)

Ĉu la simboleco de la rakonto respondas al fizika realaĵo oni ja ne povas decidi, sed ĉiukaze la forto de la simbolo estas evidenta kaj la analogio inter Kristo kaj suno facile komprenebla. La instruo de Kristo spirite iluminis liajn disĉiplojn same kiel la suno fizike lumigis ilin. Se la Kristo malaperas, ankaŭ la suno foriĝu, sed samkiel la suno reaperas post eklipso [aŭ vualigo] la Kristo resurektas post mallonga tempo.

La potenco de tia simboleco povas esti plifortigata per jena elemento : la **sunkrono**, kutime ne videbla, subite aperas dum la fazo de totaleco. (...) La analogio estas forta, evidenta : la malapero de la suno kaŭzas la aperon de ties krono, kaj la morto de la Kristo rivelas lian gloron.

Suneklipso ...aŭ luneklipso ?

Suneklipso, totala en Antarkto, okazis du semajnojn antaŭ la luneklipso je la 3-a de aprilo 33. Ĝi estis nevidebla en Palestino sed ne maleblas ke iuj tiam kalkulis ke ĝi okazos kaj interpretis ĝin kiel anoncanta renverso de la antikva ordo ; des pli ke ĝi koincidis kun la hebrea novjara tago.

Cetere, en la hipotezo ke la luno svenis en la vespero post la Krucumado, la simboleco, kvankam malpli forta ol en la kazo de suneklipso, ne estus malpli elvokiva. (...) La plena lumo ĉi-kaze simbolus la plenan konscion de la Kristo. (...)

Nu, fine, kio okazis ? Suneklipso, luneklipso ?

– *Nek unu nek la alia*, respondas tiuj kiuj vidas en la evangelia priskribo nuran simbolon...

Aldono de la redaktoro

Nur Luko, parolante pri la fenomeno de mal-lumo, diris ke la suno malaperis aŭ estis eklipsata.

Nu, ni ne forgesu ke **li verkis** sian Evangelion probable "ĉ. 80-90"⁴, aŭ almenaŭ tre verŝajne "ne antaŭ 70"⁵ ; do preskaŭ **duonjarcenton post la eventoj**. Do, se la Krucumado okazis la 3-an de aprilo 33 (tion, pri kio ni ne certas, mi tamen akceptu, kiel hipotezon), **ĉu Luko ne povis konfuzi tri malsamajn fenomenojn :**

- "mallumo" ekde, aŭ depost, la 12-a ("6-a") ĝis la 15-a ("9-a"), eble pro fulmotondraj nubegoj ;
- *luneklipso*, la *samtagan vesperon* ;
- *suneklipso*, nur du semajnojn pli frue.

Des pli ke sur la ĉi-apuda bildo, **malgraŭ ilia aspekto, ja ne temas pri du sunoj** ; apud la maldekstra astro estas skribite⁶ : *Arekag-na-havarel*, "la suno malheliĝis" (eklipsiĝis), kaj aliflanke de la dekstra : *Lusin-n-havarum*, "la luno malheliĝis".

Cetere, kiel komparo, jen rakonto pri la morto de du famaj rabenoj, laŭ la *Jerusalema Talmudo* :

"Kiam mortis Rabeno Hanan oni vidis stelojn en plena tagmezo (...). Ĉe la morto de Rabeno Samuelo *ben* [filo de] Rabeno Isaako, (...) fajro mal-suprenvenis el la ĉielo (...); dum tri horoj tondroj kaj fulmoj trakuris la teron..." (*Abodah zarah*, 3,1)

(Fine, mi petas pardonon pro mia interveno ene de tiu ĉi artikolo.) □

(Fino de la redaktoraĵoj notoj)

3/ Ĉar Luko *tuj* aldonas : "kaj la kurteno de la sanktejo disŝiriĝis en la mezo" (23,45).

4/ X. Léon-Dufour, art. "Evangelies", en *Encyclopaedia Universalis*, vol. 6, 1971, p. 818c.

5/ Ĉar, kvankam notoj en la *Bible (...) de l'Ecole Biblique de Jérusalem* asertas : "Luko **anoncas** la sieĝon de Jerusalemo. Kiel en 19,43-44, liaj esprimoj estas bibliaj kaj **tute ne estas priskribo farita post la evento**" ; ekzegezistoj tamen vidas en 19,43-44, 21,20 kaj 24 postajn aludojn al la romiana preno de Jerusalemo.

6/ Laŭ *Nouveau dict. ill. français-arménien* de Guy de Lusignan, Paris, 1900, I, p. 783a-784 ; kaj Daniel Solakian, CNRS-esploristo, diplomita de *Languages O*.

Serĉataj

Mi pristudas kiamaniere oni esprimas la koncepton pri **eklipso en ne okcidentaj lingvoj**, kaj kion precize signifas tiuj vortoj aŭ esprimoj.

Mi ankaŭ serĉas fotojn de la totala suneklipso je la 11-a de aŭgusto 1999.

Se vi deziras sendi al mi informojn aŭ fotojn, aŭ mendi mian franclingvan libron (kun rabateto) :

Adr. : Yono Lanier, 2 rue Désirée, F-69001 Lyon.
Tel/faks. : +33 (0) 478 396 757. Y.Lanier@lemel.fr

La Serĉado de l'Sankta Gralo :

[122,20] *"Sire, fet Lancelot, qui fu cil qui tant a parlé a vos ? Son cors ne poï je veoir, mes sa parole oï je bien, qui est si laide et si espoantable qu'il n'est nus qui poor n'en deust avoir."*

– *"Sire, fet li preudons, poor en doit len bien avoir, car il n'est riens qui tant face a douter come cil, car c'est cil qui done conseil a home de perdre cors et ame."*

Lors set bien Lancelot qui cil est de qui il parole. Et li hermites li dist qu'il li face compaignie (...) Il oste ses armes et les met en la chapele, et vient a son cheval et li oste la sele et le frain, puis revient au preudome por fere li compaignie. Et quant il sont ensemble assis, il li comence a demander : *"Sire chevaliers, n'estes vos Lancelot dou Lac ?"* Et il dist oïl.

– *"Et que alez vos querant einsi armez come vos estes ?"*

– *Sire, je vois o mes autres compaignons querre les aventures dou Saint Graal."*

"Certes, fet li preudons, querre les poez vos, mes au trover avez vos failli. Car se li Sainz Graax venoit devant vos, je ne cuit pas que vos le poissiez veoir, ne plus que uns aveugles feroit une espee qui devant les eulz li seroit. Et neproquant maintes genz ont demoré en teniebres de pechié lonc tens et en obscurté, que Nostre Sires rapeloit puis a veraie lumiere, si tost come il veoit que li cuer i entendoient. Nostre Sires n'est pas lenz de secorre son pecheor : si tost come il aperçoit qu'il se torne vers lui en cuer ou en pensee ou en aucune bone oevre, il le vient tost visiter."

Et se cil a garni son ostel et netoié einsi com pechierres doit fere, il descent et repose en lui, ne puis n'a li pechierres garde qu'il s'em parte s'il ne l'enchace fors de son ostel. Mes s'il i apele autre qui contreres li soit, il s'em part com cil qui plus n'i puet de morer, quant cil i est aqueilliz qui toz dis le guerroe."

Lancelot, cest essample t'ai mostré por la vie que tu as si longuement menee puis que tu chaîs en pechié, ce est a dire puis que tu receus l'ordre de chevalerie. Car devant ce que tu fusses chevaliers avoies tu en toi herbergiees toutes les bones vertuz si naturellement que je ne sai juene home qui poïst estre tes pareuz."

"Sinjoro, diris Lancelot, kiu estis tiu kiu tiom parolis al vi ? Lian korpon mi ne povis vidi, sed mi bone aŭdis lian parolon [= voĉon] kiu estas tiel malbela kaj tiel timiga ke estas neniu kiu ne devis havi timon pro li."

– *"Sinjoro, diris la noblulo, timon oni ja devas havi pro li ĉar estas nenio kio tiom igas dubi kiel tiu, ĉar estas tiu kiu donas al homo konsilon perdi korpon kaj animon."*

Tiam bone scias Lancelot, kiu estas tiu pri kiu li parolas. Kaj la ermito diras al li ke li restu en lia kompanio (...) Li demetas siajn armilojn kaj ilin metas en la kapelon, kaj venas ĉe sian ĉevalon kaj demetas ĝiajn selon kaj bridon ; poste li revenas ĉe la noblulon por resti en lia kompanio. Kaj kiam ili kune sidas, tiu ĉi komencas demandi :

– *"Sinjoro kavaliro, ĉu vi ne estas Lancelot del Lago ?" Kaj li diras jes.*

– *"Kaj kion vi serĉas, rajdadante tiel armita kiel vi estas ?"*

– *Sinjoro, mi iras kun miaj aliaj kompanianoj, serĉi la aventurojn de l'Sankta Gralo."*

Admono de la ermito

"Certe, diras la noblulo, ilin serĉi vi povas, sed por ĝin trovi vi [jam] malsukcesis. Ĉar se la Sankta Gralo venus antaŭ vin, mi ne kredas ke vi povus ĝin vidi, ne pli ol blindulo vidus glavon kiu estus antaŭ liaj okuloj. Kaj tamen, en tenebroj de peko kaj obskuro longan tempon restadis multaj homoj kiujn Nia Sinjoro poste revokis al la vera lumo tuj kiam li vidis ke la koroj strebis al tio. Nia Sinjoro ne estas malrapida por savi sian pekinton : tuj kiam li ekvidas ke tiu ĉi sin turnas al li en koro aŭ en menso aŭ en ia ajn bona ago, li tuj venas viziti lin."

Kaj se tiu ĉi aranĝis sian gastejon [= koron] kaj [ĝin] purigis tiel kiel pekinto devas fari, li mal-suprenvenas kaj ripozas en li ; kaj poste la pekinto ne timu ke tiu foriros, se li ne forpelos lin el sia gastejo. Sed se li tien vokas alian kiu estas kontraŭa al tiu, tiu foriras de li kiel iu kiu ne plu povas tie resti kiam estas akceptata tiu kiu ĉiun tagon militas kontraŭ li."

Lancelot, tiun ekzemplon mi montris al ci pro la vivo kiun ci tiel longe vivis post kiam ci falis en pekon, tio estas nome post kiam ci estis akceptata en la ordenon de kavalirismo. Ĉar antaŭ ol ci fariĝis kavaliro ci gastigis en ci ĉiujn bonajn virtojn tiel nature ke mi ne konas junan viron kiu povus esti cia egalulo."

XI – La iamaj virtoj de Lancelot...

Virgineco

Car tout premierement avoies tu virginité herbergiee en toi si naturellement qu'onques ne l'avoies enfrainte ne en volenté ne en oeuvre. Solement en volenté ne l'avoies tu pas enfrainte ; car maintes foiz avint que quant tu pensoies a la viuté de la colpe charnel en quoi viginitez est corrompue, tu escopissoies en despit et disoies que ja en ceste maleurté ne charroies.

Et lors affermoies tu qu'il n'ert nule si haute chevalerie come d'estre virges et d'eschiver luxure et garder son cors netement.

Ĉar tute unue ci gastigis en ci virginecon, tiel nature ke neniam ci malkonformiĝis al ĝi nek en volo nek en ago. [Eĉ] nur en volo ci ne malkonformiĝis al ĝi ; ĉar multajn fojojn okazis ke kiam ci pensis pri abomeneco de la karna peko per kiu la virgineco estas rompata ci kraĉis pro malestimo kaj diris ke neniam en tiun ĉi malfeliĉon ci falos.

Kaj tiam ci asertis ke estas neniŭ tiel alta kavalirismo kiel esti virga kaj eviti malĉastecon, kaj gardi sian korpon pura.

Humileco

Aprés ceste vertu, qui tant est haute, avoies tu humilité. Humilité vet doucement et soef, le chief enclin. Ele ne fet pas ausi come fesoit li pharisieux qui disoit quant il oroit au temple :

"Biau sire Diex, je te rent graces et merciz de ce que je ne sui pas ausi mauvés ne ausi desloiax come sont mi voisin."

Tiex n'estoies tu pas, ainz sembloies le publican qui n'osoit nes regarder l'ymage, que Diex ne se corroçast a lui por ce qu'il estoit trop pechierres, ainz estoit loign de l'autel et batoit sa colpe, et disoit : "Biau sire Diex Jhesucrist, aiez merci de cest pecheor !"

En tel maniere se doit maintenir qui droitement veut acomplir les huevres d'umilité. Einsi fesoies tu quant tu estoies demoisiaux, car tu amoies et cremoies ton creator sor toutes choses et disoies que len ne devoit nule terriane chose douter, mes len devoit douter celui qui puet des-truire cors et ame et bouter en enfer.

Post [la ekhavo de] tiu ĉi virto, kiu estas tiom alta, ci havis humilecon. Humileco iras dolĉe kaj milde, kun kapo klinita. Ĝi ne faras tiel kiel faris la fariseo kiu diris, kiam li preĝis en la templo :

"Bela sinjoro Dio, mi redonas al ci gracon kaj dankon pro tio ke mi ne estas tiel malbona nek tiel mallojala kiel estas miaj najbaroj".

Tia ci ne estis, sed similis la impostiston kiu eĉ ne aŭdacis rigardi la bildon, por ke Dio ne kole-riĝu kontraŭ li pro tio ke li estas tro pekema, sed estis malproksima de la altaro kaj batadis [sian bruston por esprimi] sian kulpon kaj diris :

*"Bela sinjoro Dio Jesukristo, estu favora al tiu ĉi [= mi] pekulo !"**

En tia maniero devas sin teni kiu volas lojale plenumi la agojn de humileco. Tiel ci faris kiam ci estis fraŭlo ĉar ci amis kaj respektesis cian kreinton super ĉio, kaj diris ke oni devas timi nenion ĉi-teran sed oni devas timi tiun kiu povas detrui korpon kaj animon kaj ĵeti en inferon.

Pacienco

Aprés ces deus vertuz que je t'ai devisees avoies tu en toi soffrance. Soffrance si est semblable a esmeraude qui toz dis est vert. Car soffrance n'avra ja si fort temptacion que ele puisse estre vaincue, ainz est toz dis verdoianz et en une meisme force, ne ja nus n'ira contre li qu'ele n'emport toz dis la victoire et l'onor. Car nus ne puet si bien vaincre son anemi come par soffrir.

Quelque pechié que tu feisses par defors, ce sez tu bien en ta pensee que ceste vertu avoies tu en toi herbergiee trop naturellement.

Post tiuj ĉi du virtoj kiujn mi priparolis ci havis en ci paciencon. Pacienco estas simila al smeraldo kiu ĉiam estas verda. Ĉar pacienco neniam havos tenton tiel fortan ke ĝi povos esti venkata, sed estas ĉiam verdanta kaj en sama forto ; nek iam io iros kontraŭ ĝi [sen] ke ĝi ĉiam gajnos la venkon kaj la honoron. Ĉar neniŭ povas tiel bone venki sian malamikon, kiel la pacienco.

Kian ajn pekon ci faris ekstere, ci ja scias en cia menso ke tiun ĉi virton ci estis gastiginta ege nature.

* Komparu kun la originala parabolo en la *Evangelio* laŭ Luko, 18, 10-14. Kaj rimarku ke la ermito senkonscie kaj tute anakronisme aldonas "Jesuo Kristo" kvankam la impostisto venis en la Jerusaleman templon kaj estis judo.

Rekteco

Après avoies tu une autre vertu herbergiee en toi si naturellement comme se ele te venist de nature : ce ert droiture. Droiture si est une vertuz si fort et si puissant que par li sont toutes choses tenues en droit point, ne ja nule foiz ne se changera, et a chascun rendra ce qu'il avra deservi et ce que droiture li aportera. Droiture ne done a nului par amor ne ne tolt par haine, ne ja n'espergnera ami ne parent, ainz s'en ira toz jorz selonc la ligne de droiture en tel maniere que ja ne changera fors de droite voie por aventure qui aviegne.

Poste [kaj krome], ci gastigis en ci alian virton tiel nature kiel se ĝi estus veninta al ci de naturo : tio estis rekteco. Rekteco estas virto tiel forta kaj potenca ke per ĝi ĉio estas tenata en konvena loko ; kaj ke neniun fojon ĝi sin ŝanĝos kaj al ĉiu redonostion kion li estos meritinta, kaj tion kion rekteco alportos al li. Rekteco donas al neniun pro amonek prenas pro malamo, nek iam indulgos amikon nek parencon, sed iros ĉiam laŭ la rekta linio, tiamaniere ke neniam ĝi deflankiĝos de la rekta vojo pro aventuro kiu okazus.

Karitato

Après ceste vertu eus tu en toi charité si hautement herbergiee que ce ert merveille. Car se tu eusses toutes les richesses del monde entre tes mains, tu les osasses bien doner por amor de ton criator. Lors estoit li feus dou Saint Esperit chاوز et ardanز en toi, et estoies volenteis et ententis en cuer et en ame de tenir ce que ces vertuz t'avoient presté.

Einsi garniz de toutes bontés et de toutes vertuz terriennes entras tu ou haut ordre de chevalerie. Mes quant li anemis, qui primes fist home pechier et le mena a dampnacion, te vit si garniz et si coverz de toutes parz, si ot poor qu'il ne te poüst sorprendre en nule maniere. Si veoit apertement que trop exploitast bien a son oes, s'il te poüst metre fors d'aucun de ces poinz ou tu estoies.

Il vit que tu estoies ordenez a estre serjanز Notre Seignor et fus mis en si haut degré que ja mes ne te deusses abessier jusque au servise de l'anemi. Si te douta molt a assaillir por ce que sa peine i cuida perdre.

Post tiu ĉi virto ci gastigis en ci karitaton, tiel alte ke tio estis mirindaĵo. Ĉar [tiam] se ci havus ĉiujn riĉaĵojn de la mondo inter ciaj manoj, ci ne hezitus ja doni ilin por amo de cia kreinto. Tiam la fajro de l'Sankta Spirito estis varma kaj arda en ci, kaj ci estis volema kaj strebema en koro kaj en animo gardi tion kion tiuj virtoj pruntedonis al ci.

Tiel ekipita per ĉiuj bonecoj kaj per ĉiuj teraj virtoj, ci eniris en la altan ordenon de kavalirismo. Sed kiam la malamiko, kiu unue igis homon peki kaj kondukis lin al damno, vidis cin tiel ekipita kaj tiel kovrita de ĉiu flanko, tiam li timis ke li neniamaniere povos surprizi cin. Tamen li klare vidis ke li ege sukcesus, multe por sia profito, se li povus meti cin ekster tiujn [virtajn] statojn kie ci estis.

Li vidis ke ci estis destinita esti serĝento de Nia Sinjoro kaj estis metita en tiel altan gradon ke neniam ci devus malsupreniĝi ĝis la servo de la malamiko. Kaj li multe hezitis cin sturmi pro tio ke li kredis perdi sian penon pri tio.

Sed ĉu Lancelot rezistos al tento ?

Lors se pensa en mainte maniere coment il te porroit decevoir. Et tant qu'au darreain li fu avis qu'il te porroit plus tost mener par fame que par autre chose a pechier mortellement, et dist que li premiers peres avoit esté per fame deceuz, et Salemons li plus sages de toz les terriens, et Sansons Fortins li plus forz de toz homes, et Absalon li filz David li plus biax hons dou siecle. "Et puis, fist il, que tuit cil en ont esté deceu et honi, il ne me semble mie que cist enfes i deust avoir duree."

Tiam li pripensis laŭ multaj manieroj kiel li povus cin trompi. Kaj ĉe la fino li opiniis ke li povos konduki cin ĝis morta peko pli frue per virino ol per aliaĵo. Kaj li diris ke la unua [pra]patro¹ estis trompita de virino ; kaj Salomono², la plej saĝa el ĉiuj teranoj ; kaj Ŝimŝon la Fortulo³, la plej forta el ĉiuj viroj ; kaj Absalono⁴, la filo de Davido, la plej bela viro en ĉi-mondo. "Kaj ĉar, li diris, ĉiuj tiuj estis trompataj kaj malhonorigataj pro tio, ne ŝajnas al mi ke tiu ĉi infano devas havi reziston antaŭ tio."

1/ Adamo, de Evo (אָדָם : Havva). Vidu Genezon 3, 1-7.

2/ "La reĝo Salomono amis multajn aligentajn virinojn : la filino de Faraono, Moabidinoj, Amonidinoj, Edomidinoj, Cidonaninoj, Ĥetidinoj (...) Li havis da ĉefaj edzinoj 700 kaj da kromvirinoj 300 ; kaj liaj edzinoj forklinis lian koron. En la tempo de maljuneco de Salomono liaj edzinoj turnis lian koron al aliaj dioj." (I. Reĝoj, 11, 1-4.)

3/ Trompita de Delilo. Vidu Juĝistojn 16, 4-21.

4/ Fakte li decidis, laŭ konsilo ne de virino sed de Aĥitofel, seksumi kun la kromvirinoj de sia patro. (II. Sam. 16.)

Esperanto-rezolucioj

"Ne estis mocio por aprobi la rezolucion proponitan de ASISTI, tiel ĝi ne estis akceptata" (de la Ĝenerala Konferenco de IARF en Vankuvero).

Sed pro antaŭsendo de ties anglalingva teksto al ĉ. 70 el la membroj-grupoj ni ricevis **4 favorajn reagojn**; kaj eble tiu ĉi agado iomete influis por la akcepto de pli sukcesa propono ĉe temgrupa sesio pri "Lingvo kaj homaj rajtoj" en **Seulo** : **35** reprezentantoj de **NROj*** partoprenis en tiu kunveno organizita de la "Koalicio de NROj por Internacia Helplingvo" (al kiu invitiŝ la ASISTI-a rezolucio).

Jen la teksto de ilia unuanima rezolucio, poste adoptita de la plen-kunsido pri "**Homaj rajtoj**", unu el la kvin temoj de la Konferenco de la NROj (pli ol 600, reprezentitaj de 7000 partoprenantoj) :

La Tema Grupo pri Homaj Rajtoj
de la Seula Internacia Konferenco 1999 de NROj
rekomendas

1/ke la *Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj (EKOSOK)* metu en la tagordon de sia proksima kunsido la temon "Lingvo kaj homaj rajtoj", kun la celo diskuti problemojn de tutmonda lingva politiko, kaj la neniigon de homaj rajtoj kaŭze de lingva malegaleco ;

2/ke tia kunsido konsideru la nomumon de komisiono por esplori la uzeblecon kaj praktikecon de internacia helpa lingvo ;

3/ke EKOSOK raportu al la Ĝenerala Asembleo de UNO pri la rezultoj de ĝiaj malkovroj (...)

* Ni ankoraŭ ne ricevis la liston de la partoprenintaj Ne-Registaraj Organizaĵoj, sed okazis prelegoj de la Bahaa Internacia Komunumo, kaj de la Ŭonbulisma Eklezio, kiu estas membro-grupo de IARF...



NÁBOŽENSKÁ SPOLEČNOST ČESKÝCH UNITÁŘŮ
110 00 Praha 1, Karlova 8 - telefon 2422 9592

Kara d-ro Lavarenne, Prago, 12-8-1999

Multan dankon pro via letero kies legado ĝojigis min. Estis mirinde, legi en via sendaĵo pri la provo kunigi la mondajn religiojn por kune labori, kaj por labori al la Monda Komunumo. Ĉiuj ĉi temoj estas parto de niaj prelegoj kaj diservoj en nia preĝejo de la *Religia Societo de la Ĉeĥaj Unitarianoj kaj Universalistoj*.

Mi bedaŭras skribi ke mi ne povis ĉeesti la IARF-kongreson en Vankuvero, kaj do ne povis ion fari por subteni la proponon de ASISTI. Mi kredas ke Esperanto povos unuigi la mondon : kiam ĉiuj popoloj povos kompreni unu la aliajn.


Mia patrino, kiu vivas en Montreal, estas esperantistino. En Kalifornio ŝi intime kunlaboris kun Stella Toogood, kiu estas delonga esperantistino kaj ankaŭ Kvakerino.

Certe, nia *Religia Societo de la Ĉeĥaj Unitarianoj kaj Universalistoj* subtenos kiun ajn ideon pri Esperanto kiel monda lingvo kiu devus esti instruata en ĉiu lernejo, tiel ke ĉiuj popoloj, daŭrigante paroli sian propran lingvon, estu kapablaj paroli unu kun la aliaj, kio estas tiel grava en la nuna mondo.

Bonvolu sciigi al mi, mi petas, kiel la Religia Societo povos helpi en la admirinda laboro kiun vi faras. Mi estus feliĉa resti en kontakto kun vi kaj lerni pli pri viaj agadoj. Nu, eble iam ni povos renkonti unu la alian (...)

Plej sincere,

Rev. *Vladimir Strejcek*
(retadr. unitari@comp.cz)



Unitaria Eklezio de Sud-Afriko

12-8-1999

Kara Sinjoro,

Dankon pro via letero (...). Bedaŭrinde, ankaŭ mia Eklezio ne estis reprezentata ĉe la IARF-kongreso kiu okazis ĉi-monate en Vankuvero ; ni do ne povis fari ian agadon pri la rezolucio prezentita de via Societo. (...) Sincere via

I.R. Carlisle, Sekretario

Estimata C. Lavarenne,

13-9-1999

Mi lastatempe eksciis ke via organizaĵo ASISTI respondecis por enkonduko de rezolucio pri Esperanto ĉe la IARF konferenco en Vankuvero, antaŭ kelkaj semajnoj. Mi deziras pli da informo pri via organizaĵo ; kaj ĉu vi intencas klopodi enkonduki similan rezolucion en la estonteco ? Ni devos kunlabori pri tio. [Prof.] *Ronald J. Glossop*

Kara Christian,

1999 07 15

Mi ricevis kopion de la materialo kiun vi sendis al la 70 IARF-membroj. Ĝi ŝajnas al mi tre bona.

Kaj krome mi kredas ke vi ja precize kaptis la spiriton de *Kampanjo 2000* kiam temas pri sentima disanoncado de la mesaĝo pri Esperanto, almenaŭ al homoj kaj asocioj kiuj devus esti principe favoraj al niaj ideoj.

Lee Chong-Yeong certe estos tre kontenta (...)

Se vi opinias ke UEA povas iel helpi por la antaŭenigo de via kampanjo celanta religiajn grupojn en la mondo, bonvolu ne heziti peti.

Mi certe vidus kun granda intereso la fortiĝon ankaŭ administran de ASISTI. Ĝi povus esti grava faktoro en la ĝenerala informado pri Esperanto.

Amike

[d-ro] *Renatto Corsetti*
(UEA-Vicprez.)

Respondeto : La problemo estas ĉefe financa, ĉar nia revuo, 500-ekzemplera, ne havas multajn pagantojn...

Jogosutro de Patañjali :

विशेषाविशेषलिङ्गमात्रालिङ्गानि गुणपर्वाणि ।

viśeṣāviśeṣa-liṅgamātrāliṅgāni guṇa-parvāṇi // 19 //

दृश्यानां तु गुणानां स्वरूपभेदावधारणार्थमिदमार-
भ्यते-विशेषाविशेषलिङ्गमात्रालिङ्गानि गुणपर्वाणि ।
तत्राकाशवाय्वग्न्युदकभूमयो भूतानि शब्दस्पर्शरूप-
रसगन्धतन्मात्राणामविशेषाणां विशेषाः ।

तथा श्रोत्रत्वक्चक्षुर्जिह्वाघ्राणानि बुद्धीन्द्रियाणि ।
वाक्पाणिपादपायपस्थानि कर्मेन्द्रियाणि, एकादशं
मनः सर्वार्थमित्येतान्यस्मितालक्षणस्याविशेषस्य
विशेषाः । गुणानामेष षोडशको विशेषपरिणामः ।

षडविशेषाः तद्यथा शब्दतन्मात्रं स्पर्शतन्मात्रं
रूपतन्मात्रं रसतन्मात्रं गन्धतन्मात्रं चेति । एक-
द्वित्रिचतुष्पञ्चलक्षणाः शब्दादयः पञ्चाविशेषाः ।
षष्ठश्चाविशेषोऽस्मितामात्र इति । एते सत्तामात्र-
स्यात्मनो महतः षडविशेषपरिणामाः ।

यत्तत्परमविशेषेभ्यो लिङ्गमात्रं महत्त्वं
तस्मिन्नेते सत्तामात्रे महत्यात्मन्यवस्थाय विवृद्धि-
काष्ठामनुभवन्ति । प्रतिसंसृज्यमानाश्च तस्मिन्नेव
सत्तामात्रे महत्यात्मन्यवस्थाय यत्तन्निःसत्तासत्तं
निःसदसन्निरसदव्यक्तमलिङ्गं प्रधानं तत्प्रतियन्ति ।
एष तेषां लिङ्गमात्रः परिणामो निःसत्तासत्तं
चालिङ्गपरिणाम इति ।

अलिङ्गावस्थायां न पुरुषार्थो हेतुर्नालिङ्गावस्था-
यामादौ पुरुषार्थता कारणं भवतीति । न तस्याः
पुरुषार्थता कारणं भवतीति । नासौ पुरुषार्थकृतेति
नित्याख्यायते ।

त्रयाणां त्ववस्थाविशेषाणामादौ पुरुषार्थता कारणं
भवति । स चार्थो हेतुर्निमित्तकारणं भवतीत्यनित्या-
ख्यायते ।

गुणास्तु सर्वधर्मानुपातिनो न प्रत्यस्तमयन्ते नोप-
जायन्ते । व्यक्तिभिरेवातीतानागतव्ययागमवती-
भिर्गुणान्वयिनीमिहपजननापायधर्मका इव प्रत्यव-
भासन्ते ।

यथा देवदत्तो दरिद्राति । कस्मात्? यतोऽस्य
म्रियन्ते गाव इति । गवामेव मरणात्तस्य दरिद्राणं
न स्वरूपहानादिति ।

duśyānāṃ tu guṇānāṃ sva-rūpa-
bhedāvadhāraṇārtham idam ārabhyate : viśeṣāviśeṣa-
liṅgamātrāliṅgāni guṇa-parvāṇi / tatrākāśa-vāyv-
agny-udaka-bhūmayo bhūtāni śabda-sparśa-rūpa-
rasa-gandha-tan-mātrāṇām a-viśeṣāṇāṃ viśeṣāḥ /

tathā śrotra-tvak-cakṣur-jihvāghrāṇāni buddhīn-
driyāṇi / vāk-pāṇi-pāda-pāyūpasthāni karmēndriyāṇi
ekādaśaṃ manaḥ sarvārtham ity etāny asmitā-
lakṣaṇasyāviśeṣasya viśeṣāḥ / guṇānāṃ eṣa
ṣoḍaśako viśeṣa-pari-ṇāmāḥ /

ṣaḍ a-viśeṣāḥ tad yathā śabda-tan-mātraṃ
sparśa-tan-mātraṃ rūpa-tan-mātraṃ rasa-tan-mātraṃ
gandha-tan-mātraṃ cēti / ek-dvi-tri-catuṣ-pañca-
lakṣaṇāḥ śabdādayaḥ pañcāviśeṣāḥ / ṣaṣṭhaś cāvi-
śeṣo 'smitā-mātra ity / ete sattā-mātrasyātmano ma-
hataḥ ṣaḍ a-viśeṣa-pari-ṇāmāḥ /

yat tat param a-viśeṣebhyo liṅga-mātraṃ mahat
tattvaṃ tasminn ete sattā-mātre mahaty ātmāny ava-
sthāya vivṛddhi-kāṣṭhām anubhavanti / prati-saṃ-
sṛjyamānās ca tasminn eva sattā-mātre mahaty
ātmāny avasthāya yat tan niḥ-sattāsattam niḥ-sad-
asan nir-asad avyaktam aliṅgaṃ pradhānam tat
prati-yanti / eṣa teṣāṃ liṅga-mātraḥ pari-ṇāmo niḥ-
sattāsattam cāliṅga-pari-ṇāma ity /

aliṅgāvasthāyām na puruṣārtho hetur aliṅgāvas-
thāyām ādau puruṣārtha-tā kāraṇam bhavatīti / na
tasyāḥ puruṣārtha-tā kāraṇam bhavatīti / nāsau pu-
ruṣārtha-kṛtēti nityākhyāyate /

trayāṇāṃ tv avasthāviśeṣāṇām ādau puruṣārtha-
tā kāraṇam bhavati / sa cārtham hetur-nimitta-kāra-
ṇam bhavati a-nityākhyāyate /

guṇās tu sarva-dharmānupātino na praty-
astam-ayante nōpajāyante / vyaktibhir evātītānāgata-
vyayāgama-vatībhir guṇānvayinībhir upajananāpāya-
dharmakā iva praty-avabhāsante /

yathā devadatto daridrāti / kasmāt ? yato 'sya
mriyante gāva ity / gavām eva maraṇāt tasya dari-
drāṇam na svarūpa-hānād ity /

II – Ĉapitro de la *plenumado* (sekvo)

(*Spirita sintezo de eŭroplingvaj tradukoj*)

19. La manifestadaj materiaj modoj karakteriziĝas per krudaj aŭ subtilaj elementoj konkretigitaj aŭ ne.

(*Redaktora laŭvorta traduko el sanskrito*)

19. La [tri] kvalitoj¹ dividiĝas en konkretaĵoj, nekonkretaĵoj, nuraj koncepteblaĵoj, nekoncepteblaĵoj.

Sanskrita komentario de Vjaso

Kaj [nun] komenciĝas tiu ĉi [aforismo] kiu celas determini distingojn en la propra naturo de la [tri] kvalitoj de la percepteblaĵoj.

Tie [oni unue diru ke] la [kvin] elementoj, etero, aero, fajro, akvo [kaj] tero, [estas] konkretigoj de la nekonkret[e imagebl]aj [kvin] "subtilaj elementoj"² de la sono, tuŝo, [videbla] formo, saporo kaj odoro.

Same : oreloj, haŭto, okuloj, lango kaj "flarilo" [t.e. *nāsā* : nazo] estas la [kvin] "organoj de la konsciilo" [la sens-organoj]. Buŝo, mano, piedo, anuso kaj sekso estas la [kvin] organoj de ago ; la dekunua [organo] estas la menso, [priskribita kiel] "rilatanta kun ĉiuj" [dek organoj]. Tiuj ĉi [dekunu estas] la konkretaĵoj de la nekonkreta atributo mi-konscio³. Tio ĉi estas la deksexobla transformiĝo de la [tri] kvalitoj en konkretaĵojn.

Tiel, la ses nekonkretaĵoj [estas] tiu [mi-konscio], la subtila elemento de sono, la subtila elemento de tuŝo, la subtila elemento de formo, la subtila elemento de saporo kaj la subtila elemento de odoro.

La kvin nekonkretaĵoj – sono ktp. – havas unu, du, tri, kvar, kvin atributojn.⁴ Kaj la sesa nekonkretaĵo estas la pura mi-konscio. Tiuj ĉi estas la ses transformiĝoj en nekonkretaĵojn, de la granda Atmano [kiu estas] pura ekzisto.

Kio [estas] trans la nekonkretaĵoj, tio [estas] la nur konceptebla granda principo ; tiuj ĉi [nekonkretaĵoj], kiam ili ensorbiĝas en tiun grandan atmanon [kiu estas] pura ekzisto, atingas la ekstremon de sia kresko. Kaj "retro-kunfluigitaj", kiam ili ensorbiĝis precize en tiun grandan atmanon [kiu estas] pura ekzisto, ili retroiras en tion kio estas la neperceptebla, nekonceptebla kaŭzo ekster ekzisto/neekzisto, ekster realo/nerealto, ekster nerealto. Tiu ĉi nur konceptebla transformiĝo de tiuj [nekonkretaĵoj, per reensorbiĝo,] estas transformiĝo en la nekoncepteblaĵon ekster ekzisto kaj neekzisto.

En la stato de nekoncepteblaĵo, ne la celo de la Persono [t.e. Dio] estas la motivo [de la transformiĝo]; nek, ĉe la komenco en la stato de nekoncepteblaĵo, la fakto ke la Persono havas celon estas la kaŭzo. Nek la fakto ke la Persono havas celon estas la kaŭzo [de la transformiĝo] el tiu [stato de nekoncepteblaĵo]. Nek tiu estas okazigata per la celo de la Persono ; oni diras ke ĝi estas konstanta [aŭ eterna, do sen komenco nek ŝanĝiĝo, kaj absoluta].

Sed ĉe la komenco de la tri nekonkretaj [kvalitoj] el la stato [de nekoncepteblaĵo], la fakto ke la Persono havas celon estas la kaŭzo. Kaj en [sia] celo Ĝi estas [ilia] efika kaj materia kaj cela kaŭzo ; oni diras ke Ĝi estas nekonstanta.

Sed la kvalitoj, [kvankam] sekvantaj ĉies karakterizaĵojn, nek retromalkreskas nek naskiĝas. Nur per la manifestiĝoj, kiuj malaperas kaj aperas en la pasinteco kaj estonteco kaj havas kvalitojn, [tiuj kvalitoj] ŝajnas karakterizitaj per naskiĝo kaj finiĝo.

Tiel : "Devadatta malriĉiĝas. Pro kio ? Ĉar liaj bovinoj mortas." De la morto nur de la bovinoj venas lia malriĉeco, ne de la "forlaso de sia propra formo" [t.e. de lia propra morto].⁵

Notoj

1/ Virto (*sattva*), pasio (*rajas*) kaj tenebro (*tamas*), el kiuj konsistas la realo.


2/ Laŭvorte "nur tio"-o : "nuraĵo".

3/ Laŭvorte : "mi estas"-eco. Laŭ multaj hinduoj ĉiuj dekunu jenaj perceptoj aŭ agoj estas erare atribuitaj al iu nekonkreta "mi" (kiu eĉ tute ne ekzistas laŭ la budhistoj). Anstataŭ "mi" aŭdas, oni devus ekkonscii ke nur tiuj ĉi oreloj aŭdas sonon ; "mi" sentas : fakte tiu ĉi haŭto estas tuŝata de tuŝo ; "mi" vidas : tiuj ĉi okuloj vidas formon ; mi gustumas : tiu ĉi lango gustumas saporon ; "mi" flaras : tiu ĉi nazo flaras odoron ; "mi" manĝas : tiu ĉi buŝo manĝas ; "mi" prenas (faras...) : tiu ĉi mano prenas (faras...) ; "mi" paŝas : tiuj ĉi piedoj paŝas ; "mi" fekas : tiu ĉi anuso fekas ; "mi" seksumas : tiu ĉi sekso kuniĝas kun alia ; "mi" pensas : tiu ĉi menso pensas.


4/ "La subtila elemento de etero posedas unu karakterizaĵon, t.e. sonon ; tiu de aero havas du, t.e. sonon kaj tuŝon ; tiu de la lumo [aŭ fajro] havas tri, t.e. sonon, tuŝon kaj formon ; tiu de akvo havas kvar, t.e. sonon, tuŝon, formon kaj guston ; kaj tiu de tero havas kvin, t.e. sonon, tuŝon, formon, guston kaj odoron." (Bangali Baba, p. 46.) Tiu maniero dividi la realon ne tute similas al la "*kredo de la antikvuloj*" (...okcidentaj !, sekve de Empedoklo, 5-a jc. a.K. kaj Platono...) pri la 4 elementoj kiuj konsistigas la universon (PIV, *elementoj*).

5/ Tiu ĉi ilustraĵo signifas la konstantan plenecon de la substanco konata kiel la nekonceptebla kaŭzo. Simple ties karakterizaĵoj, atributoj kaj statoj estas ŝanĝiĝemaj. Miloĵ da lampoj povas esti ekbruligitaj de unu lampo, sed la luma povo de la origina lampo ne ricevas malkreskon pro tio. (*Noto de Bangali Baba.*)

Granda Unueca Kredo



Parto I, ĉapitro 2
Mekanismo



1. Je nomo de GUKo,
vi devus penegi al la sino de GUKo: vi gloros!
En laboratorio, fizikisto jene diras, ĉe manko de simetrio: "La sistemo sin organizu al pli kompleksa ŝtupo!"
Sorto ja troviĝas en molekuloj varmigataj.
La lumon de vero elradias la brusto de GUKo.
Amen.
2. Je nomo de GUKo, sama mekanismo troviĝas:
– en formiĝo de laser-radio,
– en konstruado de truo de formikoj,
– en vivado de homo,
–
Tiel mia grandeco reliefas. Amen.
3. Amo estas brako de GUKo, per kiu GUKo karesas siajn gefilojn en la frosta kosmo kaj ne lasas ilin foriĝi el sia varmeta sino.
Amen.
4. Je nomo de GUKo,
mi igu malfortan fluon nuliĝi en pli fortan fluon;
tiel mia volo fortiĝos:
ĉe mutacio, kompleksa kaj impona sistemo aperos!
Amen.
5. Antaŭe
la arbo velkas, la forto de amo prosperas!
en la cirkulado de energio mia abundeco sur la folio.
Ĉe ŝtono mia signo aperus, ĉe koro la vero belus!
Ĉu la folio signifas morton?
La nigra tero montras vivecon!
Kontraŭ vi, la apero ordiĝos!
la apero foriĝos!
6. Je nomo de GUKo,
laŭ sorto eteto povus fariĝi egego:
ĉar najlo perdiĝis, difektiĝis do la hufofero;
rompiĝis do la kruro de milit-ĉevalo;
vundiĝis la kavalerio:
malvenko en la milito!
tiel pereis la imperio...
7. En GUKo amo inkluzivas la forton de fiziko.
Kiel pompe la energio funkcias en GUKo!
Amen.
8. Kara amiketo, vi demandas kio estas amo?
– Tio estas la varmeto de via patrino sino (en la frosto), per kio panjo varmigu vian etan korpon;
tio estas forto per kio bovo tiras ĉaregon en kampo.
9. En sama ŝtupo de apero mi lasu ilin konkuri
en kunesto per amo. Ili estas egoismaj kaj
ne kolektiĝas ĉirkaŭ GUKo, ili do kune pereu!



Tao Te Ching



("Klasikaĵo pri la Vojo kaj Virto")
de Lao-tzu

(Laŭ la kutima principo de *Asistilo*, ĉiam provi proponi plurajn alirvojojn al la vero (se ĝi ekzistas?), aŭ almenaŭ al veraĵoj, jen dua traduko de ĉapitro 14*, kiun mi petis de la prezidanto de *Universala Tao-Stud-Ligo Esperantista*, s-ro **Bradio V. Moro III.**)

Kion oni rigardas kaj ne vidas,
tio nomiĝas la Nevidebla;
Kion oni aŭskultas kaj ne aŭdas,
tio nomiĝas la Neaŭdebla;
Kion oni tenas sed ne kaptas,
tio nomiĝas la Nepalpebla¹.
Ĉi tiuj tri ĉiuj evitas nian esploradon.
Tial ili miksiĝas tiel ke Ĝi fariĝas unu.

Ties supro ne estas luma,
Ties malsupro ne estas malluma.
Kontinua², Ĝi ne estas nomebla.
Ĝi reiras al Senaĵeco³.
Tial Ĝi nomiĝas la Formo de la Senforma,
La Bildo de Senaĵeco.
Tial Ĝi nomiĝas la Nebula.

Alirante Ĝin oni ne vidas la kapon,
Sekvante Ĝin oni ne vidas la malantaŭon.

Tenu la Vojon de Antikveco,
por pritrakti la nuntempajn realaĵojn.
Povi scii la Antikvan Komencon
estas la kunliga principo² de la Vojo.

* Vidu la unuan en n-ro 23 p. 30 (ĉe *GUKo* I,1,18).


1/ "Nevidebla", "Neaŭdebla", "Nepalpebla" estas ĉine "Yi, Hsi, Wei", kiu memorigis jezuitajn sciencistojn en Ĉinujo pri la Biblia Di-nomo יהוה (*YHWH*: "Jehova" aŭ "Yahwe").

Ĉiu el la 3 "versoj" estas 7-silaba t.e. 7-ideografiaĵa ĉar paralela kun la aliaj en strukturo: verseca karakterizo. (Ankaŭ la sekva "verso" estas 7-silaba, sed ne paralela.)


2/ La vera signifo de "sheng-sheng" laŭlitere "-nuro-nuro" estas eble perdita. La klasika ĉefkomentariisto Wang Pi ne komentas tiurilate, kaj modernaj komentariistoj kaj tradukistoj ege malsamas inter si. Ni pli malpli sekvas Lin Yü-t'ang kaj Richard Wilhelm. Povas esti, ke la kontinueco estas la *kialo* por la nenomebleco aŭ ke la nenomebleco ekzistas *malgraŭ* la kontinueco.

Krome, notu ke "-nuro" similas al la "kunliga principo" sur la lasta linio, kiu estas laŭlitere "fadeno". En la kazo de tiu termino (*chi*), tamen, la signifo estas sufiĉe klara, kaj ankaŭ tradukeblas per "sistemo", aŭ "unueco", aŭ "kontinueco".

3/ "Wu-wu" (du malsamaj "wu"-oj: "sen + aĵo") ne signifas precize "nenion", sed specon de realo en kiu ne estas reciproke dividitaj estaĵoj.



Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista



Estas fondita *Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista* (TOLE), kies sidejo estas en Bulgario. En *Espero*, organo [i.a.*] de TOLE, aperis jena alvoko al tutmonda ortodoksa esperantistaro :

Estimataj kaj karaj gefratoj ortodoksuloj,
(...) Nun, ankaŭ ni havas la eblecon, kiel en aliaj landoj kie regas tradicie katolika, protestanta aŭ alia religio, tute libere esprimi niajn sentojn.

En la tuta Esperanto-movado aktive agas kaj havas aŭtoritaton diversaj fakaj E-religiaj asocioj.

Jam proksimiĝas la Jubilea 2000-a jaro. Tiam ankaŭ ni reprezentantoj el la monda esperantistaro, de diversaj kristanaj religioj, devus unuigi niajn fortojn por solena festado de la Glora Jubileo.

Ni plej afable invitas vin kaj aliajn viajn gekonatulojn ortodoksulojn aliĝi al nia Ligo. Viajn leterojn sendu al la jena adreso por kontaktoj : TOLE, p/a *Esperinform*, Ing. Boĝidar Leonov, p.k. 44, BG-4300 Karlovo, Bulgario.

* Vidu *Asistilo* 21, p. 10 kaj 29. (*Noto de la Red.*)

Kristana Jubileo

"En la sanktejo de Don Kamilo oni preĝos en esperanto". La Sanktejo de la *Madonna dei Prati*, pri kiu Guareschi skribas en siaj famaj romanoj, kandidatiĝis por ricevi la titolon de *Preĝejo de la Jubileo por Esperanto* : en la jaro 2000 en la preĝejo de la *Madonna dei Prati*, unuvoĉa preĝo povus kunigi la pilgrimantojn.

La preĝejo situas en la komunumo **Busseto** (PR), famkonata pro Giuseppe Verdi. (Adreso de la organiza komitato : Associazione Culturale "*Club dei Ventitré*", Via Processione, 160, IT-43010 Roncole Verdi (PR), Italio. Faksnumero : 0524 / 91642.)

(Laŭ *K.E.C.-Bulteno* n-ro 278 (7-1999), p. 4)

Santiago de Compstelle : E-pilgrimo en la jaro 2000

Mi instigas al kampanjo "*Esperantistoj survoje al Santiago en 2000*". Mi planas piede pilgrimi de la 15-a de julio ekde St-Jean-Pied-de-Port (francaj Pireneoj) al Santiago (Hispanio) : 750 km.

Mi invitas kiel eble plej multajn esperantistojn esti samtempe survoje por ke en la rifuĝejoj, la tranoktejoj por pilgrimantoj, oni aŭdu nian lingvon.

Estus tre agrable renkonti aliajn esperantistojn kaj iri kun iuj parton de la vojo. Sed mi ne celas aliĝi al tuta grupo aŭ organizi tian ĉar tio tre komplikigas la piediran pilgrimadon. Por informoj : Rudolf Fischer, Gustav-Adolf Str. 2a, D-48356 Nordwalde. Faks. (0 25 73) 6 26 ; fischru@uni-muenster.de

Leteroj

Strasburgo, 13-9-1998

La nunaj francaj katolikoj kutime kredas je la paradizo, sed ne je infero. La kutimo konfesi siajn pekojn al pastro malaperis ; kaj tio estas **ĝojinda por la pastroj ĉar ili estas tre malmultaj** (en la regiono de mia patrino, 2 por 20 paroĥoj) : **ili eĉ ne povas entombigi ĉiujn**, do, se ĉiuj volus konfesi siajn pekojn ĉiumonate – kiel mi faris en mia infanaĝo – ili ne povus fari tiom da laboro.

Ĉe la palmodimanĉo, la pastro diris ke **li pardonas la pekojn de ĉiuj** kiuj alportis branĉaĵojn. Ĉar mia onklino estas 75-jara tio ŝokis ŝin, do ŝi insistis ke la pastro aŭdu ŝiajn pekojn. Sed, ŝajne, la aliaj katolikoj de la vilaĝo kontentiĝis per la kolektiva pardono ĉe la benado de la branĉaĵoj.

La "du Kristianoj" [la alia estas Ch. Baudé, red. de *Laŭte*] rebatas al mi : Baudé diras ke li eble ne estas ateisto, kaj ci, ke ci eble ne estas katoliko. Ĉu mi estas kristano, kiu ne kredas ke Jesuo releviĝis el la mortintoj (mi ne estis tie por konstati) ? Ke Dio torturigas sian filon por eviti torturi la tutan homaron en la infero ŝajnas al mi tute absurda kredo ; tion mi klopodis pruvi al ambaŭ kristanoj kaj anarkistoj esperantigante la verkon de **Kropotkin pri la interhelpo**, kies konkludon ci bonvolis aperigi en *Asistilo* [n-ro 9 (vintro 1992), p. 90].

(Bedaŭrinde mi antaŭvidas ke la **anarkistoj** degeneros, same kiel degeneris la kristanoj : jam ili pretas preni pafilon por trudi al ĉiuj ateismon. Mi ne sentos min cenzurita se ci ne aperigos tion.)

Aŭ ĉu tamen pravas Nikolao Gudskov, asertante, post atenta legado de miaj leteroj (kaj li eble estas la ununura ateisto kiu min komprenis), ke mi estas ateisto ? (...) Amike, **Jacqueline**

("2-7-99. Mi decidis nenion publikigi inter 1-3-99 kaj 1-3-2002." Sed kiel en *Laŭte*, tio ĉi estis skribita antaŭe.)

Lukala, 30-6-99

Ĉiuj numeroj de *Asistilo* estas tre ŝatataj en Lukala. Kiam mi ne plu ricevas ilin granda silento okazas. Mi treege ĝojis pro la fakto ke ili instruis min multe koncerne ekleziojn. Tiel mi rimarkis ke ĉiuj celas por si mem, pravigante nur sian eklezion. Ankaŭ en nia lando, tio tute ne diferencas. Ĉu ne ekzistas **unu preĝmaniero, spirita** ? (...) Ĉu la seminarioj okazas ĝis nun ? Estus bone, se dum viaj diskutoj kaj debatoj, vi faru ilin spirite, kaj ne laŭ ĉies aparta pensmaniero ĉar tiel solvo ne facilas.

"**Saĝulo scias ion, sed neniu scias ĉion.**"

Al Argelio, el Habano (20, p. 27) : mi petas de li, senĉese mediti tiun libron [la Biblio]. Ĝi estas vere Sankta kaj profunda. Kaj ne similas al romano. Tial neniu povas fanfaroni ke li ĉion scias ene. (...) Frate via

Nlandu Lnyala

Ni ricevis

Libere de la konoj, de Jiddu Krishnamurti, trad., *Antaŭparolo kaj Biografieto*, de Yves Bachimont, Varna (BG): Bambu, 1999, 95 p. ISBN 954-9637-04-2 (Originalo: *Freedom from the Known*, Londono: Victor Gollancz Ltd, 1969). Sed la eldonisto eraris skribante ke ĝi estas la unua trad. de Krishnamurti en esperanto. Nia biblioteko posedas kvar aliajn:

Ĉe la piedoj de la Majstro, de Alcyone (J. Krishnamurti), kun permeso tradukita de W. W. Mann, Paris: Presa Esperantista Societo, 1913, 88 p.

Sperto kaj konduto: parolado dirita en Ommendaro 1930 kaj disradiita, de J. Krishnamurti, tr. de Petro Stojan, Solliès-Pont: Internacia Biokosma Asocio, 1932, 22 p. (Donacita de d-ro A. Albault)

El "**Vivo antaŭen**" (*Life ahead*), de Krishnamurti, elangligis Katrin', en *Laŭte* 72 (6/8-1987), p. 30.

El "**Liberiĝi el tio konata**", de Jiddu Krishnamurti, esperantigis Kribo, en *Laŭte* n-ro 79 (11/12-1988), p. 22-23. ISSN 0150-5823.

Kaj ankoraŭ ekzistas almenaŭ du libroj, eldonitaj de S.A.T.-broŝurservo (Cargue Sac, F-47470 Beauville): **Eduko kaj vivisignifo** (antaŭ 1989), kaj **Fronte al la vivo kaj aliaj tekstoj** (antaŭ 1992).

Skizoj por la eklezia historio de la reformacio kaj la kontraŭreformacio, de d-ro János Csóhány, trad. de Tibor Papp, Debreceno: Debrecena Esperanto-Societo, 1999, 28 p. Lingve reviziis partoprenintino en la 2-a ISE: Eva Farkas-Tatár. ISBN 963 03 7295 9. (La hungaran originalon eldonis la Eklezihistoria katedro de Debrecena Reformacia Teologia Akademio, 1994, ISSN 0209-472 X.)

La nova Evo, de Petro Danov, antaŭparolo de G. Radev (1932), Serres: Vivo por la Tuto, 1999, 69 p.

Imperia purecaĵo, de Dr. Ts. Bold, Ulanbatoro: Ya-zu Esperanto Akademio, 1999, 27 p. (7-paĝa disertaĵo pri Yazu-religio en la Yazua lingvo plus Ya-zu English Esperanto Mongolia vortareto laŭ la vicordo de *Ya-zu*, kiu signifas "Radiko".)

Kantu ja Cion: [72] Poemoj el la Sankta Lando, Jerusalemo: Centro Sivron, 1998/5758, 80 p.

Libro de Ĥanoĥ: (elektajoj el la apokrifajo *Apokalipso de Ĥanoĥ*), de Eva D. Kovács, traduko de Tibor Papp, enkonduko de Béla Hamvas, antaŭparolo kaj faka revizio de d-ro László Kormos, [Debrecen]: Debrecena Bulteno, 1998, 53 p.

Zamenhof kaj judismo, de A. Cherpillod, Courgenard: Memeldono, 1997, 62 p, ISBN 2-906134-41-4.

Lastminute: Ni ricevis librojn, el kiuj kelkaj religiaj, kiel subvencion el *Biblioteka apogo*. **Dankon** al ĝi!

Ali, la simbolo de humaneco: realaj rakontoj el la vivo de Imamo Ali, de S. Morteza Mirbaqian, Tehran: Atai Eldonejo, [s.d.], 50 p. (Kun 5-paĝa traduko de "Maksimoj de Imamo Ali".)

Skizo de Kvakerismo, de Gordon Browne, trad. de Herbert Bell, Kvakera Esperantista Societo, 1994, 7 p. (Originalo: *Introducing Quakers*).

4 Sezonoj: hajkoj en 4 lingvoj, kolekt[ad]o kaj esperantigo de Marjam Nezami, kun tradukoj angla de Daniel C. Buchanan kaj persa de A. Paŝai, enpaĝigo de Ramin Varzandeh, Tehrano: Amir H. Varzandeh (edzo de la kompilintino), 1994, 120 p.

Kie penso, tie mondo, de DEGUĈI Hidemaro (3-a kungvidanto de Oomoto), tr. MAEDA Ŝigeki, kun *Antaŭparolo* (25-12-1993), dulingva, Kameoka: Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto, 65 p.

La Sankta Meso: Ritiro de la Meso kun popolo (Preĝlibreto en Esperanto), Zaragozo: Katolika Esperantista Hispana Asocio, 1993, 32 p.

La fragmentoj de Heraklito, trad. de Gerrit Berveling, Breda: Voĉoj Kristanaj, 1990, 30 p.

La Libro de la Spiritoj: enhavanta La Principojn de la spiritisma doktrino, de Allan Kardec, trad. de Porf. L. C. Porto Carreiro Neto, Brasília: Federação Espírita Brasileira, 1989², 479 p.

Tambur-eĥo, de Ergoto de Bonaero [Adam Hryniewicz], Buenos Aires: Argentina Esperanto Instituto, 1989, 72 p. (Serio "Post unu jarcento", 4).

Kanto al paco: Sankta Francisko el Asizo (patrono de LBV), de diversaj aŭtoroj, São Paulo: Legio de Bona Volo, [s.d.: 1989?], [40 p.].

Al miaj karaj amikoj per Esperanto, de E. Hanhiniemi, Ingham, 1988, 20 p. (vidu *Lingvologia R.*)

Dio estas silento, de Pierre Lacout, trad. de J. Richard Evens, kun konsilo de S-ro Reto Rossetti kaj helpo de F-ino D. Fulford Londono: Kvakera Esperantista Societo, 1987, 24 p. ISBN 0 9509347 2 0

Diverskolora bukedeto: Poemoj trad. el 40 lingvoj, de Francisco Valdomiro Lorenz, Rio: Federação Espírita Brasileira, 1987², 159 p.

Tajĝiĉjùan, Pekino: Ĉina E-eldonejo, 1986, 63 p.

Lingvologia Revuo [1,1-7: 1966-1971], de Emil Hanhiniemi, Ingham: Hanhiniemi, 1979, 71 p. (deko da p. pri filozofio kaj religio), ISSN 0024-3965.

La libro de la medioj, de Allan Kardec, tr. de L. C. Porto Carreiro Neto kaj Ismael Gomes Braga, Rio: Brazila Spiritisma Federacio, 1964, 430 p.